

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 509

MARTO 1948

LA EVANGELIO LAŬ SPIRITISMO

De ALLEN KARDEC

El la franca lingvo tradukis Ismael Gomes Braga

Nepre defio al ortodoksa pensado, ĉi tiu interpreto pri la Evangelio havas ĝeneralan intereson por ĉiu religiano, sed precipe por la Kristano ĝiaj instruoj kaj komentarioj havas gravon.

La lingvo estas simpla, klara kaj modela; inda perilo por tiel profunda temo.

Verko studinda kaj rekomendinda.

432 paĝoj sur tre bona papero.

Prezoj : broŝ. 8ŝ. 6p., tolbind. 10ŝ. 6p., duonleđa 23ŝ. Aŝranko 9p.

Eldonita de

BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Argentino, Buenos Aires (8), Amalia 347 (Liniers), S-ro Giordano Bruno López, p.m. k.ĉ.l., kvanto kaj valoro reciprokaj. Certe respondos.

Brita oficiro serĉas postenon en Japanujo. Parolas hindustanan, germanan, kaj francan lingvojn. Korespondas hispane, itale. Stenografias angle. Lieŭt. A. J. Cameron, National Bank of Scotland, Inverness, Skotlando.

Ĉu vi iros al Malmö? Se jes, vojaĝu iom pli frue por ĉeesti la internaciajn feriajn E-kursojn en Helsingør (Elsinoro), Danlando, nur 3 horojn de Malmö. Kurstempo : 17–24 kaj 24–31 je julio. Tie vi ekhavos bonegan lingvan ekzercon antaŭ la kongreso. Prospekto havebla ĉe S-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Ĉarpentistoj tutmondaj. Mi deziras interŝanĝi leterojn kun alilandaj agemaj lignaĵistoj pri laboro kaj vivkondiĉoj en iliaj landoj. Bonvolu skribi al S-ro Albert Moody, 37 Upper Tooting Road, Tooting, London, S.W.17, Anglujo.

Fr. Svaĉina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo ĝis renaskiĝo, ne nur ĝis morto.

Kiu interŝanĝos geografiajn librojn, broŝurojn en Esperanto por Esp.-libroj? Roma Nielsen, Ole Suhrsgade 2, København, Danujo.

Agrabla kaj simpla Belgo deziras gastigon por ok tagoj dum la Malmö-kongreso; ankaŭ korespondi kun junaj gesamideanoj partoprenantaj la kongreson. Camille B. Tousseyn, Statiestr. 35, Jabbeke, Brugge, Belgujo.

1. Kiuj geedziĝis per Esperanto? **2. Kiuj estas** denaskaj Esperantistoj? **3. Por** Danubvala kongresa ekspozicio sendu specimenon de ĉijaraj revuoj, gazetoj, libroj, k.t.p. **4. Ĉu** ekzistas lernolibro en via lando pri Esperantlingva komerca korespondado? Ĉiun informon ni rekompencos kaj petas ĝis la 1a de Aprilo. Esperanto-grupo, Győr 8, Hungarujo.

Unuan letervesperon organizos la Kidderminster Esperantista Klubo en Aprilo. Garantiata respondo. Skribu multnombre al S-ro Wilfred Barker, "Croydon", 1 Oldnall Road, Kidderminster, Worcs., Anglujo.

S-ro Majetić Franjo, aktoro, Varazdin, translokiĝis en Zadar, kaj petas amikojn skribi. Adreso: Majetić Franjo, Nacia Teatro, Zadar, Jugoslavujo.

Angla farmaciisto volas korespondi kaj interŝanĝi p.m. tutmonde. Skribu al F. C. Bailey, 18a Booths Farm Road, Great Barr, Birmingham 22a, Anglujo.

Mi volas korespondi kun la tuta mondo per koloritaj poŝtkartoj. Certe respondo. Drmola Drahoslav, studento, Tlapáková 8, Ostrava I, Ĉeĥoslovakujo.

Arnhemaj Esperantistoj volonte deziras ricevi leterojn kaj poŝtkartojn el ĉiuj partoj de la mondo antaŭ la 15a de Majo. Respondo garantiata. Sekretariejo de L.E.E.N., Amsterdamseweg 78, Arnhem, Nederlando.

Nederlandanino 38-jara kun 5-jara filo deziras korespondi kun Svedujo kaj Danujo. F-ino Lucie Weijer, Reehorsterweg 36, Ede, Nederlando.

Korespondi rilate al speciala edukado de korp-difektuloj deziras David D. Bartholomew, 819 S. Third Avenue, Bozeman, Montana, Usono.

Ĉeĥoslovakujo, Hradec Kralové II, Bretislavova 1057, fraŭlino Ružena Smišková, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Libroamikoj. S-ro Arvid Pettersson, Karlslundsgatan 6, Skövde, Svedujo, deziras kontakti kun librokolektantoj en la tuta mondo. Nepre respondos.

S-ro Bror A. Wiman, Tomtebo, Tärnsjö, Svedujo, deziras korespondantojn por interŝanĝi pm., pk., kaj semajnajn gazetojn.

Klubo Esperantista de Västerås aranĝos letervesperon en Marto. Sendu salutojn. Respondo garantiata al ĉiu S-ino Anna Westberg, Klockartorpsgatan 4, Västerås, Svedujo.

Roverskoltoj fervore deziras korespondi. Tuj skribu al Yves Gicquel, 8 Boulevard Richard-Lenoir, Paris 11, Francujo.

Pri arto, ĝiaj historio, skoloj, arkitekturo, pentrado, skulpto, grafiko, bildpresado, nur kun fakuloj, antaŭmilitaj amikoj, kaj konatemuloj mi deziras korespondi kaj interŝanĝi. Czechowski Bol, Aleja Przyjaciół 9, Warszawa, Polujo.

Dentaj teknikistoj! La ĉefredaktoro de "The Dentist Technician" volas ricevi informojn pri la kondiĉoj de dentaj teknikistoj ĉie. La luksa, monata gazeto estas oficiala organo de la brita sindikato. Korespondas angle, france, Esperante. 22 Rosebank Avenue, Elm Park, Essex, Anglujo.

Kiuj deziras reprezenti la "Esperanta Film-Grupo"-n en sia lando, bonvolu sin anonci grandnombre el ĉiuj landoj. Antwerpsestraat 45, Bergen op Zoom, Nederlando.

Oficistino el Ĉeĥoslovakujo serĉas sincerajn amikojn el ĉiuj landoj por interŝanĝo de leteroj, kiujn direktu al adreso: Jarmila Herzerová, Čechova 11, Plzeň, Ĉeĥoslovakujo.

Esperantista Societo "Nova Sento" organizos letervesperon por klubanoj kaj kursanoj meze de Aprilo. Sendu leterojn, bildkartojn, al la sekretario, Herzogstraat 40, Den Helder, Nederlando.

Deziras interŝanĝi vidaĵ-poŝtkartojn kun ĉiuj landoj S-ino Lucja Badowska, Konarskiego 52, Kraków, Polujo.

Internacia transporto kunportas varojn el eksterlando okaze de aŭtomobilvojaĝoj en Eŭropo: Le Sage, Chaussée La Hulpe, Boitsfort, Belgujo.

Biston, 59 rue Hospice, Boitsfort, Belgujo, interŝanĝas pm. pk.

Korespondcentro—Interŝanĝo: il. pk., pm., turistaj broŝuroj. Ekspozicio—letervespero: 15 Majo. Reciproka gastigado. Filatele: Waversestweg 1676, Oudergem, Brussel, Belgujo.

Samideano pollanda, de jaroj loĝanta en Aŭstralio, deziras korespondi (se eble aerpoŝte) kun ĉiulandaj judaj Esperantistinoj en Esperanta, angla, pola, juda, franca, aŭ germana lingvoj. Nepre respondos al ĉiuj korespondantinoj. Adreso: Mr. Ben Ehrlich, 74 Birriga Road, Bellevue Hill, Sydney, N.S.W., Aŭstralio.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Marto 1948

N-ro 509 (3)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro :
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅛ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

LA LINGVA SITUACIO

post la dua mondmilito

La venko de 1945 neniigis por ĉiam la germanan aspiron je hegemonio. Ĝi detruis ankaŭ la germanan influon en internaciaj rilatoj, tiom en bona kiom en malbona senco. Ĝi fine forigis la influon de la germana lingvo en Eŭropo, influon multparte ŝuldatan al la judoj, disvastigitaj germanajn produktaĵojn. Ĉi tiu lasta fakto estas unu el la ironiaĵoj de la historio. Tri lingvoj batalis inter si pri la rolo de *internacia* peradlingvo en Eŭropo. La angla, la franca kaj la germana. El tri konkurantoj fariĝis laŭvide du. La rusa lingvo ne povas anstataŭi la germanan en ĉi tiu batalo de lingva imperialismo.

Germanujo iam havis la eblon esti defendanto de praktikaj ideoj en internacia sfero, inter ili ekzemple la postulo pri internacia help-lingvo. Ne malmultaj samideanoj kalkulis je tio, ĉar de lingva vidpunkto la germana idiomo troviĝis en sama pozicio kiel aro da lingvoj de malgrandaj nacioj.

Hodiaŭ la demando pri internacia lingvo havas alian aspekton. Per la venko en 1945 la supereco de la angla lingvo eksterordinare kreskis kaj ĝin akompanas la ofte konstatita malprogreso de la franca, hodiaŭ vera *cindrulino* en internaciaj kongresoj kaj kunvenoj. La nunaj diplomatoj jam ne nutras sin ĉe la sino de la franca kulturo, kio videble ankaŭ influas la tonon de iliaj paroloj !

Se la rusa lingvo havas sian naturan terenon de ekspansio en Azio, ankaŭ la hispana laŭgrade kreskas je gravo, danke al la influo de la Latina Ameriko en ĉiuj sferoj. La lernado de ĉi tiu lingvo konstante kreskas en Eŭropo, plia signo, ke la pezocentro kultura lokiĝas je la okcidento.

Por Esperanto la situacio fariĝis tia en multaj landoj, ke ĝi devas preskaŭ esti en opozicio al la angla lingvo kaj ties forte puŝata instruado. Tio verdire ne estas la celo de nia movado. La roloj de ambaŭ lingvoj estas nete malsamaj. La angla *estas mondlingvo*, dume Esperanto volas esti *helplingvo*, nenio alia ! La lernado de la angla (kiel de ĉiu nacia lingvo) ne ĝenas nin. Ni nur kontraŭas la ideon, ke nacia idiomo povus esti la internacia HELPLINGVO, tie, kie la naciaj idiomoj ne sufiĉas.

Ni iam forte esperis, ke la Sovet-Unio, antaŭ jardekoj protektanto de nia ideo, proponos al ceteraj nacioj studi la demandon pri Esperanto. Multaj favoraj signoj flanke de Sovetio pravigis nin je tiu espero. Ho ve, nenio restis, la nuna sinteno pri Esperanto de ĉi tiu ŝtataro neniel diferenciĝas de tiu de la Tria Regno. Simpla konstato, nenio alia.

Paradoksa estas nun la situacio, ke ni devas deziri ke aliaj grandaj lingvoj anoncu sian rajton esti rekonita en internaciaj rilatoj. Ju pli da tiaj aspirantoj sin anoncas, despli ni rajtas atendi, ke oni iam re-ekzamenos la demandon pri sinteza lingvo, kiu ne pretendas ian hegemonion. La naciismo en lingva sfero iam kunhelpas al la efektivigo de la sole ebla solvo : la adopto de Esperanto kiel internacia helplingvo !

H.J.

D-ro Vox :

LA EPOKA TURNIGO—KAJ NI

Neniu taksas Esperantujon kiel potencfaktoron kunludantan en nuntempa politiko. Nek la solvo de lingvaj malhelpaĵoj, nek la antaŭenpuŝo de la interna ideo per si mem, kiu ja konformas al la ĉiama celado de multe pli potencaj ekleziaj komunumoj — faros rimarkeblan influon al diplomaĵa agado.

Tamen, ni citu oftan modernan eldiron: Ni nun venkos—aŭ neniam! Ĉu iom da reala vero ekzistas en tiu ĝema konstato? Nu jes gesamideanoj, — nia sorta horo jam batis! Zamenhof iagrade antaŭvidis la estontan situacion de internacia lingvo inter la frotado de la grand-potenca politiko. Sed kion li ne povis antaŭdiveni, estas la fakto, ke en la jaro 1950 la demando pri mondrespubliko jam estos aktuala, en tempo, kiam Esperanto marŝas ankoraŭ ĉiam surloke. Do, alivorte, Esperanto ne estas laŭ-nombre sufiĉe forta, por bonŝance eniri la finbatalon. Fakto, kiu en baldaŭa estonteco ne povos ŝanĝiĝi. Ĉu tial ni rezignu pri fortostreĉa agado kaj kondutu mizere kiel nuraj akceptantoj de sortobatoj? Se estas permesite al aŭtoro, aŭdigi sian opinion: mi pensas, ke ne! Ni havas atutojn en la ludo, kiuj taŭgas por elfunde ŝanĝi la situacion. Zamenhof kreis la admirindan ilon kaj nun ni uzu ĝin—unufoje en seriozega senco—por diskonigi al la homaro novan idearon, kiu finos la pli ol pridubindan kulturon de la tiel nomata Novtempo kaj fingremontas al la aŭroro de nova—kosma—epoko, jam anoncita, antaŭ 2000 jaroj, de genia psikologo—Jesuo de Nazareto.

Ekzistas nur malmulte da novaj veraĵoj sur ĉi tiu mondo; la scienhavo estas kunportata de multaj generacioj. Nova estas nur la perspektivo el kiu oni rigardas ĉion. Tia tutnova perspektivo rezultas el la moderna atomfiziko. Kiam la serĉanta homo malligis la terurajn fortojn de la atomkerno, li samtempe enrigardis en fulmlumo la strukturon de la universo. La senlaca enpenetrado en la sekretojn de la naturo tiel estas malbeno kaj beno samtempe. Sed oni ankoraŭ ne vidas klare, oni ankoraŭ hezitas elparoli la konsekvencojn. Neniu uragano ekfuriozas sen antaŭa anonco per ventopuŝoj. Fizikistoj jam starigis teoriojn, kiuj renversas la ĝisnunan fizikan bazon, kvankam ili ne rekte eldiras tion. Estas neeble, kontinue prezenti la aferon per kelkaj linioj; ni tial devas limigi nin je kelkaj indikoj.

Ĝenerale, sciencistoj rekonas, ke la universo estas evoluaĵo, ke la impresaro iel komenciĝis en praaj cirkonstancoj. Post kiam malkovriĝis la atomeroj, la kerno kaj la elektronoj, oni parolas

pri la “materio” de la atomo kaj la “energio”, kiu en formo de lumo, varmo, elektro k.t.p. en-kaj el-iris la atomon. Tiun limlinion oni devis fine forigi; oni eksciis, ke materio kaj energio estas la sama afero. Protonoj, neŭtronoj, elektronoj, mezonoj k.t.p. ne ekzistas pro tio, ke ili konsistas el ia nedetruebla maso, sed nur tial, ke io ne plu difinebla *moviĝas*. Konklude el tio, la tuta kosmo en la senco de la impresaĵa mondo, ŝuldas sian ekziston nur al rotaciegantaj energi-volvaĵoj kaj ĝi en la sama momento malekzistus, se la energio ĉesus moviĝi. Tiu konstato estas gravega rilate al la signifo de la *nulo* en moderna kalkulado. La leĝo pri konservado de la energio en sia nova formo, ne plu estas esprimebla per la ĝisnuna *nul*-koncepto. Kiam ni ordinare kalkulas per nulo, tiam la energio estas nur for el nia formulo, cetere ĝi ekzistas ie ekstere en la mondo. Sed nun—en la nova senco—kiam ni diras *nulo*, la kalkulita energio tute ne plu ekzistas, ĝi estas for el la mondo de la “ecoj”, el la impresaĵaro, kaj troviĝas en seneca mondo, kiun ni nomas *Formacio nulo*. Tiu *F.N.* kuŝas *preskaŭ senaktivece* en la maroj de la universo; ĝi estas la prapatrino de ĉiuspeca energio kaj materio. En formo de la ĝenerala gravito ĝi alfluegas per multe pli granda rapideco ol la lumo al atomoj. Tie ĝi estas kunforĝata al lum- kaj varm-kvantoj k.t.p. kaj denove ĝi komencas la vojaĝon en la kosmajn marojn.

Per la novformiĝo de la leĝo pri konservado de la energio la fiziko kompreneble ŝanĝas sian aspekton elfunde. Neklarigeblaĵoj trovas racian solvon: la lumdualismo, la periheliaj fenomenoj, la enigmo de la kvantoj k.t.p. Tamen ĉio ĉi-tio havas nur duarangan intereson por ni, kiuj ja volas klarvidi en la fenomenaron de la vivo. Estas evoluhistorie longega vojo de tiu pri-parolita *F.N.* ĝis la spiritaĵaj energioj, la Tria Formacio. Kiom alloge ankaŭ estus, sekvi la direkton de la estiĝonta vivo; ni devas nepre limiĝi je mallongaj aludoj. Koncize dirite; Post kiam senvualiĝis la energi-iradoj de praaj komenciĝoj, ni kapablas iagrade diveni la energistrukturon sur spirita kampo. El la evoluhistorio ni povas kompreni kaj analizi la homan animon, ni povas tiri precizegan limstrion inter sentado kaj pensado! Kortuŝite ni vidas la hometon nuda en sia tuta fatalo. Lia sangodelira historio deruliĝas antaŭ niaj okuloj, ni komprenas ĉion kaj kompatas lin. Kio estas civilizacio kaj kio kulturo, kio estas libereco de volo, la moralleĝo, la profetaĵo, kio estas cetere la esenca destino de homo en universo; la respondo

al tiuj demandoj estas la tasko de moderna filozofio kaj la sola vojo, kiu kondukas el mizero.

Sen batalo neniam realiĝos spirita renaskiĝo, de kiu dependas ĉio. Ni devos batali, ĉar la celo estas nobla kaj granda kaj la bonŝanco unufoja. Ne timu, ke almarŝante kaploke de nova idearo, ni povus fiaski pro iu ridinda hazardaĵo. Filozofo kontraŭmetas al la vorto "hazardo" alian, multe pli pezan: la vorton "destino". Tiu destino alparolas nin homojn nur mansigne—flustre, ke ni pleje ne ĝuste komprenas. Facile povas esti, ke juna vivĝoja homo, nome Zamenhof, iam estis alparolata de ĝi, ĉar li dediĉis sian vivon al penega laboro. Nu bone, tiu sama destinanta potenco nun en decida horo postulas de la Zamenhofaj disĉiploj eble—plenumadon?

Mallongondaj Dissendoj

Per mallongaj ondoj, sur malgranda sekcio de la registriilo de la mallongonda radio-ricevilo, oni povas dum kelkaj minutoj aŭdi radiostaciojn de la tuta mondo. Jen estas, kompreneblaj por ĉiu aŭskultanto, la parolaj kaj muzikaj dissendoj; kaj jen estas, komprenebla nur por la spertulo, la kraketado de morsalfabeto per kiu la fortaj sendstacioj interligas la plej malproksimajn partojn de la mondo.

Apartaj sekcioj aŭ *diapazonoj* de la mallongaj ondoj estas je la dispono de radio-amatoroj, kiuj post la fino de la dua mondmilito rekomencis sian viglan agadon, sian laboron en la etero.

Sabatvespere kaj dimanĉmatene ĉi tiuj amatoraj *diapazonoj* estas tiom plenaj de telefonparoloj kaj morsalfabetaj signaloj, ke ŝajnas ke oni tute nenion povus kompreni en ĉi tiu *kaĉo*. Sed iom al kutimiĝinte al ĝi, kaj streĉante sian atenton, oni komencas kompreni tiun haoson. Oni povas aŭdi amerikajn kaj eŭropajn, aŭstraliajn kaj afrikajn amatojn, kiuj vokas unuj la aliajn aŭ respondas kaj interkontaktiĝas. La tuta mondo elstaras antaŭ la *aŭda okulo* de la radio-amatoro ĉe sia radio-ricevilo. Radio-amatoro, sidante en sia propra ĉambro, en la kutima medio, *vojaĝas* per sia mallongonda sendilo-ricevilo tra la tuta mondo, kaj interkontaktiĝas kun la plej malproksimaj ekspedicioj aŭ salutas siajn samideanojn loĝantajn en iuj tropikaj, ekzotikaj, malproksimaj anguloj de la terglobo.

En la radiokomunikado oni ĝenerale uzas por sia propra bezono kelkajn specifajn *lingvojn*, la tiel nomitajn *internaciajn radiokodojn*: Z-kodon, Q-kodon k.s. Radioamatoroj de la tuta mondo uzas ioman parton de la Q-kodo, kaj krom tio ili

uzas la specifan radio-amatoran kodon *radio-ĵargono*, kiu konsistas el diversaj mallongigitaj aŭ plenaj vortoj precipe el la angla lingvo. Diversnaciaj radio-amatoroj dum siaj renkontoj en la etero—la renkonto aŭ interkontaktiĝo nomiĝas, laŭ Q-kodo, QSO—kaj sendante unu al la alia la tiel nomitan *QSL-karton* por konfirmi aŭ atesti pri la okazinta QSO, ĉiam havas pli malpli grandan malfacilaĵon pro malbona, malgranda scio aŭ nescio de la angla lingvo.

En ĉi tiu okazo ni, Esperantistoj, devas veni al la radio-amatoroj por helpi per nia universala kaj facila helplingvo. Esperanto-asocioj en ĉiu lando devas interkontaktiĝi kun la sialandaj radio-amatoroj ligoj, asocioj aŭ kluboj por trakti kaj interkonsenti pri praktika enpenetrigo de Esperanto en la radio-amatoran komunikadon, por doni al la radio-amatoroj la unusolan, komunan kaj facilan lingvon por praktika uzado.

Estas tute nenecese pruvi la gajnon kiu povos rezulti al la radio-amatoroj, se ili uzos la internacian helplingvon Esperanto; la gajno estas memevidenta.

Siavice, ankaŭ la Esperanto-movado profitos ĉar ties vicoj multobliĝos per amaso da radio-amatoroj tra la tuta mondo.

Radio-amatoro A. Syromjatnikov, UA1BF, Leningrad, Sovet-unio.

Mia pejzaĝo . . .

Mia pejzaĝ', sub viaj ondoj kaj deklivoj
nenio trovas sin, nek oro nek arĝent',
nur nuboj sur vi iras per malviglaj drivoj,
kaj super viaj arboj bruas griza vent'.

Ŝtonegoj kuŝas jen sur viaj etaj kampoj,
malriĉaj, kardoplenaj, kiujn kisas pluv',
kaj super kiuj nokte kiel oraj lampoj
aperas steloj inter iu peza nub'.

Kaj malabunda verd' sur viaj sulkoj nestas;
senĉese sur vi sonas blov' kaj ĝia kant',
kaj tiu son', ho ventaj malproksimoj, estas
mia gepatra lingvo, mia Esperant' . . .

Originalo de K. Piĉ.

Vortmankoj

Kia vorto povas vibri al la stela labirinto,
Aŭ resoni tra la Tempo ĝis la plej unua horo?
Kia vorto povas diri nian amon al mortinto,
Aŭ elkanti la muzikon ĉe la fundo de la koro?

Originalo de Brandon Clark.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

BRITUJO

Propagand-filmo

En 1945 la entrepreno *Empire Film Productions* sin turnis al Brita Esperantista Asocio kun propono pri parolfilmo pri la bezono de helplingvo kaj Esperanto. Antaŭ la problemo garantii la koston—mil pundojn—B.E.A. varbis la helpon de multaj Britaj samideanoj, kiuj pruntis al la Asocio la bezonatan monon.

La afero, kiom koncernas la produkton, jam atingis sukcesan kulminon, kaj antaŭ iom da tempo oni faris la unuan prezenton en privata teatro en Londono antaŭ invitita samideanaro. La filmo prezentas diversajn scenojn, kiuj emfazas la neceson de helplingvo kaj poste per intervjuoj kun kuracisto, instruisto (kun ties lernejanaro), verkisto, parlamentano kaj aliaj, antaŭmetas Esperanton kiel la solan solvon. La tuton komentarias en angla lingvo konata anoncisto de B.B.C., S-ro Frank Phillips.

La filmo nun estas en cirkulado kiel ordinara filmo, kaj inter multaj teatroj, kiuj rezervis ĝin por prezento, troviĝas tri el la plej grandaj kaj plej gravaj filmteatroj en Londono, en kiuj, laŭ modera kalkulo, 250.000 homoj vidos la prezentojn.

La prezento daŭras 20 minutojn kaj estas preskaŭ tute en angla lingvo. Estas tre verŝajne,

ke la rezervoj de la teatroj tra la lando konsiderinde rekompencos la elspezojn, kaj la propagando por Esperanto estos nekalkulebla.

ĈINUJO

La 14-an de Decembro Kantona Esperanto-Asocio sukcese okazigis memorkunvenon pri la 88-a datreveno de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof. Tio okazis en la salono de gimnazio, kaj ĉeestis 44 partoprenantoj. S-ano Wang prezidis kaj Censinio kaj aliaj faris raportojn. S-ano Ĝolabio, Delegito de U.E.A., salutparolis. Proksime de la kunvenejo oni starigis Esperanto-ekspozicion por la publiko. En la Ĉunsan'a ĵurnalo samtage aperis speciala aldonaĵo, naci-lingve, por propagandi Esperanton. En vespero oni festis en restoracio.

La 15-an de Decembro, samideanino Censinio parolis en la radiostacio Kantona, kaj informis pri la stato de la movado enlanda kaj eksterlanda. S-ano Wang prelegis en alia radiostacio pri Esperanto. Vespere, samideano Mincio parolis pri Esperanto, kaj post lia parolo C. Ĝolabio faris salutfrazojn por la eksterlando, S-ano Jank deklamis Esperantajn poeziaĵojn kaj F-ino Ĉen kantis. La vespera programo daŭris 55 minutojn.

Kurson en Kanton gvidas C. Ĝolabio.

C.Ĝ.



Junularo

Nove starigita sekcio de junuloj en la Franca zono de Germanujo petas la kunlaboron de ĉiuj, kiuj volas helpi gajni la junularon por nia movado. Oni petas alsendon de gazetoj, Esperantaĵoj k.s. Varbiloj kaj instruiloj estus bonvenaj. Oni skribu al: Germana Esperanto-Asocio (Junulara Sekcio—Franca Zono), Schanzenstrasse 10, EICH (Rheinhes), Germanujo.

Pri Nutraĵpakaĵoj

El Sud-Ameriko ni ricevis peton atentigi al samideanoj en la diversaj Eŭropaj landoj, ke en iuj lokoj tie, kiel ankaŭ en Eŭropo mem, oni malpermesas la forsendon de nutraĵoj eksterlanden. Tre multaj petoj direktiĝas al Brazilo kaj aliaj landoj, sed estas vane atendi plenumon. Oni petas ĉi tiun publikan anoncon por eviti la multan kaj temporaban respondadon.

GERMANUJO

El raporto sendita de Germana Esperanto-Asocio

La membrostato de G.E.A. en la komenco de 1948 estis 6021. Pli ol duono troviĝas en la Usona zono. La plej grandaj lokaj grupoj estas en Munĥeno (proks. 1000) kaj Hannover (proks. 500). Ekzistas 118 grupoj.

La unua kongreso de la unueca G.E.A. okazos dum Pentekosto 1948 en Munĥeno kaj tuj post la kongreso okazos internacia Junular-kunveno Esperantista en la Alpoj, al kiu jam aliĝis centoj da junuloj el 10 landoj.

La 8-an de Januaro oni fondis Esperanto-Instituton, kiu fariĝos parto de la Universitato en Munĥeno. Intertempe, la Bavara Kulturministerio subvenciis la Instituton per donaco de 10,000 germanaj markoj. Ĝi havas la respondecon — krom aliaj taskoj — pri ĉiuj ekzamenoj aferoj. Direktoro estas D-ro Ziegler.

La Universitato kaj la Teknika Altlernejo en Munĥeno oficiale enkondukis Esperanton. La Docento estas D-ro S. Ziegler. Krom tio la altlernejo en Giessen enkondukis Esperanton kaj Docento estas Prof. Strecker. En 63 popolaj altlernejoj oni instruas Esperanton.

Post multe da malfacilaĵoj ni ricevis la licencon eldoni *La Ponto* kiel oficialan revuon de G.E.A. Eldonkvanto 5000. Se ni ricevus la permeson eldoni pli grandan kvanton, oni povus duobligi la membraron. La Usona militista registaro en Bavarujo ĝis nun ne permesas eldoni Esperantajn librojn aŭ instrumaterialon, kaj malhelpas al la redaktoroj publikigi Esperanto-angulon en gazetoj. Tamen du ĵurnaloj *Hochlandbote* en Garmisch-Partenkirchen kaj *Wetzlarer Neue Zeitung* kaj du junularaj revuoj *Zukunft* en Reutlingen kaj *Wir* en München regule publikigas Esperanto-kursojn k.s.

Radio Munĥeno disaŭdigis—la 3-an fojon—dek-kvinminutan diskuton kun D-ro Ziegler pri Esperanto. Ĝi eĉ inklinas enkonduki regulan ĉiusemajnan kurson k.s. Kuraĝigaj vortoj de samideanoj eksterlande certe plifaciligus favoran decidon.

Esperanto certe estas tre taŭga helpilo por eduki la Germanan popolon al homaraneco kaj pacamo. Ni Germanaj Esperantistoj opinias Esperanton kiel gravan pacigilon kaj ni ne akceptas iamajn aktivulojn de la nazi-partiaj organizaĵoj. La estraro de G.E.A. estas absolute kaj senkondiĉe kontraŭ-faŝista. Tri el niaj ses estraranoj suferis dum la Hitlera reĝimo en koncentrejo, kaj kvara estis persekutita sed sukcesis fuĝi.

S.Z.

USONO

Ĉe la ŝtata Universitato de Indiano en Bloomington (Indiana) Usono, troviĝas ĉi-jare kiel *vizitanta profesoro* D-ro Björn Collinder, mondfama lingvo-scienculo, Esperanto-subtenanto, kaj profesoro de finno-ugraj lingvoj en Universitato Uppsala en Svedujo.

Usonaj lingvo-scienculoj ne multe simpatias al la mondlingva ideo. Estas espereble, ke la ĉeesto de D-ro Collinder favore influos ilin al Esperanto, ĉar ĉi tie en la Universitato troviĝas kelkaj el la plej gravaj en Usono.

POLUJO

Propagando en Varsovia Balo

En Januaro okazis en Varsovio granda balo sub titolo *Balo de Ĉifonuloj*, organizita de la studentoj de belartoj.

Samideano Pleskaczynski kaptis la okazon por trudi Esperanton, kaj kun verda togo kun duonmetra kvinpinta stelo sur la dorso, verdaj rubandoj kaj simile, sukcesis vekti la intereson de la ĉeestantoj, kiuj strebis legi la vorton *Esperanto*.

Loka ĵurnalo faris aludon pri tio en la sekvanta numero. La fotografaĵo montras nian samideanon kun la edzino.



Konferenco de Danubregionaj Esperantistoj

Kiel antaŭkongreson de la Malmö-a, H.E.S. organizas en Budapeŝto, 22–25 Julio, konferencon de la mezeŭropaj kaj orientaj vojaĝantoj, kun

partopreno de estraranoj de najbaraj landoj. Oni petas ankaŭ pri ekspozicia materialo. Oni sin anoncu al: H.E.S. Budapest VIII, Fiumei-ut. 4.

Skoltoj

La unua mondmilito naskis la Skoltan Esperantistan Ligon, kiu tamen dum kelka tempo iom vegetis. La antaŭmilita Centra Komitato de S.E.L. kunvenis en Londono en Novembro pasinta, kaj frato Bernard Tixier venis speciale el Arras, Francujo por ĉeesti. La oficistoj nun estas: Fondinto: S-ro A. W. Thomson (Avoto), Hon. Prezidanto: S-ro Norman Booth, Prez.: S-ro Douglas H. Davis, Ĝen. Sekr.: S-ro F. N. Blythe, 103 Leopold Road, Ipswich, Suffolk, Anglujo, Ĝen. Vic-Sekr.: S-ro F. Douglas Murphy.

Oni decidis tuj fliiĝi al T.J.O. por intima kunlaboro.

La oficialan bultenon *Skolta Bulteno* oni ankoraŭ ne povas eldoni, sed oni kontaktiĝos kun la membroj pere de *Oficiala Informilo*.

La naciaj sekcioj kolektos la kotizojn en sia teritorio kaj agos aŭtonomie, elektante nacian komitaton kaj lokajn perantojn en gravaj urboj.

Por ĉiuj informoj oni sin turnu al la Ĝenerala Sekretario de S.E.L.

Internaciaj korespond-rondoj de Esperantistaj kluboj

Esperantista Klubo en Teplice-Ŝanov, Ĉeĥoslovakujo, serĉas kontakton kun 20 kluboj po unu el malsamaj landoj de la mondo. La ricevitaĵoj leteroj estos legataj kaj diskutataj en la klubaj kunvenoj, same kiel la respondoj, kiuj estos kolektive ellaboritaj de la tuta klubo.

La celo estas, havigi por la klubanoj interesan, instruan kaj vere internacian programon, kaj havigi al la membroj senperan kontakton kun eksterlandaj samideanoj.

La iniciatanta klubo promesas sendi al ĉiu partoprenanta klubo minimume unu leteron dum ĉiu duo da monato; tio estas, ĝi akceptas la devon redakti minimume 120 leterojn dum jaro. Se la 20 kluboj promesas la samon, se ili korespondos ne nur kun la invitanta klubo, sed kun la ceteraj 19, tiel la unua *Internacia Koresponda Rondo* estos fondita. Praktike, tio signifas, ke 21 kluboj el 21 malsamaj landoj havos dum la tuta jaro interesan, internacian programon por siaj kunvenoj. Dum la jaro oni minimume ricevos sume 2520 leterojn, kaj estroj de la kluboj certe ĝojos havi taŭgan programon por ĉiu kunveno. La lingva ekzerciĝado super 5040 leteroj estos utila por la membraro de la 21 kluboj.

En Marto 1949 la I.K.R. decidis, ĉu utilos daŭrigi aŭ ne. Tiuj kluboj, kiuj havas seriozan intereson por ĉi tiu plano, bonvolu sin turni al S-ro Otto Sklenčka, prokuristo de Živnostenská banka, TEPLICE-ŜANOV, Ĉeĥoslovakujo. Se venos pluraj petoj el sama lando oni povos fondi duan, eĉ trian rondon.

(Ni publikigas ĉi-supran anoncon tial ke ĝi estas originala propono. Eventualaj similaj proponoj devos esti pagataj, sub *Anoncetoj*.—Rim. de red.)

* * *

Ekspozicio de infanaj desegnaĵoj

La alvoko, kiun dissendis la Esperanta Societo de Lyon, venigis 25 kolektojn kaj kelkajn apartajn desegnojn.

Inter ili precipe admirindaj estis tiuj el Hungarujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Oni decidis prokrasti la aferon ĉar la kvanto ne sufiĉas por formi seriozan ekspozicion. Oni tial ripetas la alvokon.

La temoj de la desegnoj estas libere elekteblaj, sed oni prefere ricevus desegnojn kiuj montras lokajn tipojn, scenojn, pejzaĝojn. Pri formato, oni alproksimiĝu kiom eble al 21 × 27 cm. sed oni akceptos ankaŭ aliformatajn.

Oni do precipe petas instruistojn konigi la aferon al la lernantoj kaj sendu la desegnojn amase. Se la rezulto estos sufiĉe favora oni provos rekompenci la sendaĵojn, kaj la ekspozicion oni rondirigos de urbo al urbo.

Bonvolu ĉion sendi al Richard Levin, Foire de Lyon, rue Ménestrier, LYON, Francujo.

* * *

Fama tenoro, samideano

Jam en pluraj landoj troviĝas artistoj, kiuj favoras nian ideon kaj uzas Esperanton praktike. Oni pensu nur pri Marguerite Sautreuil de la franca radio, Frank Merrick konata pianisto en Anglujo, kaj Ján Geryk ĉeĥa violonisto. La Esperantista mondo ĝojos scii, ke nova stelo leviĝis en la persono de Nuni Nanev, eminenta bulgara tenoro. La 4-an de oktobro en Olomouc okazis koncerto sub protekto de la bulgara ministro kaj ambasadoro en Ĉeĥoslovakujo, S-ro Štefan Simov, en kiu Nuni Nanev debutis antaŭ la ĉeĥoslovaka popolo. Lian prezenton oni aklame akceptis kaj la kvalitoj de lia eksterordinara tenora voĉo vekis nekutime favoran komenton ĉe la kritikistoj. Sekve de tio, ke li kantis en Esperanto krom en ĉeĥa, bulgara, rusa kaj itala lingvoj, oni faris aludon pri tio, ke evidente Esperanto tiel taŭgas por la kantado kiel la itala lingvo.

LA PETSKRIBO

Gratulon Germanujo !

La unua iniciato post nia admono, ke oni klopodu pri kolektivaj subskriboj, venis de Germanujo, kiu per kolektiva subskribo de 127,630 personoj, sub nomoj de la Prezidanto kaj Sekretario de Bayerischer Gewerkschaftsbund, Ortsausschuss München (Bavara Sindikato, Loka Komitato München) faris konsiderindan kontribuon al nia kampanjo, kaj montris nedubeble la vojon al sukceso. Se unu organizaĵo povas fari tion, estas certe, ke aliaj povas sekvi tiun laŭdindan ekzemplon. Per unu faro niaj germanaj samideanoj lokis sin ĉe la kapo de la ciferlisto kaj samtempe aldonis trionon de la antaŭa cifero. Ni atendas, ke aliaj samideanoj povos atingi simile kontentigan rezulton. Al la laboro !

Landoj

Germanujo	..	151238	Hungarujo	..	6160
Nederlando	..	47024	Islando	..	4313
Francujo	..	32668	Portugalujo	..	3462
Ĉeĥoslovakujo	..	28938	Aŭstralio	..	3370
Britujo	..	27685	Nov-Zelando	..	2540
Bulgarujo	..	21992	Svisujo	..	1885
Svedujo	..	17759	Egiptujo	..	1813
Norvegujo	..	13751	Maroko	..	1037
Jugoslavujo	..	11740	Grekujo	..	810
Italujo	..	9985	Palestino	..	528
Danujo	..	9106	Irlando	..	463
Polujo	..	8107	Urugvajo	..	460
Aŭstrujo	..	7897	Kanado	..	360
Brazilo	..	6711	Hispanujo	..	276
Belgujo	..	6614	Hindujo	..	236
Finnujo	..	6354	Ceteraj Lokoj	..	768
Argentino	..	6248			
Usono	..	6268	sumo	..	448566

Okupoj

Artistoj	..	1924	Navigaciistoj	..	1086
Delegitoj Komunumaj	..	494	Parlamentanoj	..	227
Dentistoj	..	542	Policistoj	..	2251
Desegnistoj	..	2026	Presistoj	..	3176
Dommastrinoj	..	43151	P.T.T.-istoj	..	6788
Edukaj Aŭtoritatuloj	..	1123	Religiistoj	..	1478
Elektristoj	..	2880	Sciencistoj	..	1157
Farmaciistoj	..	1218	Sindikaĉefoj	..	437
Farmistoj	..	9587	Soldatoj	..	3258
Hotelistoj	..	1613	Studentoj	..	29559
Inĝenieroj	..	13214	Ŝoforoj	..	2272
Instruistoj	..	17996	Ŝtatoficistoj	..	7388
Juristoj	..	1494	Teksistoj	..	1343
Ĵurnalistoj	..	1146	Transportistoj	..	16360
Komercistoj	..	55203	Urboficistoj	..	3481
Konstruistoj	..	6075	Vendistoj	..	8842
Kuracistoj	..	4251	Vestistoj	..	5886
Laboristoj	..	20437	Diversaj	..	147440
Lingvistoj	..	315			
Metiistoj Diversaj	..	21448	sumo	..	448566

Lastmomente : la cifero estas nun pli ol miliono, kun Norvegujo ĉe la supro.

ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

<i>Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso</i>	
Ĉiutage	16.30-16.45 Praha. 1935m. kaj 49.92m. I. 17.15-17.30 Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
Dimanĉo	22.00-22.15 Praha. 49.92m. P. 15.00-15.15 Sveda Radio. 19.80m. kaj 27.83m. I. pri la 33a Universala Kongsreso. (Nur la unuan Dimanĉon de la monato)
Lundo	11.30-11.40 PRG2 (Brazilo). 104m. P. 21.50-22.00 Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII. 22.00-22.30 Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo. (Nur la unuan Lundon de la monato). 23.30-23.35 Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bróly Sándor u. 7.
Mardo	17.05-17.10 Wien II. 31m., 41m. kaj 506.8m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV. 17.45-17.50 Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Postfach Transit, Bern. 18.50-19.00 Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia. 21.45-22.00 Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo). 22.00-22.10 Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15-10.35 Paris. 431.7m. K. 21.10-21.25 Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8. 23.30-23.35 Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45-17.50 Bern. 31.46m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat. 18.45-19.00 Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo. 21.50-22.00 Praha. 470.2m. (kiel je lundo). 22.00-22.10 Ostrava. 259m.
Vendredo	17.15-17.30 Hilversum I, 201m. "La Evangelio per Esperanto". N.C.R.V. poŝtkesto 5, Hilversum (nur je la 12a de marto). 18.50-19.00 Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia. 23.30-23.35 Budapest I (kiel je lundo).


Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

RIDO SANIGAS

Ivan Georgiev - Todor Isev
Bona kolekto de anekdotoj
Prezo aŭfrankite 9 pencoj (3 respondkuponoj)
Mendu ĉe U.E.A.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe I.E.L.



***Internacia Poŝtmarka Katalogo**, Vol. I: Grandbritujo; eldonis I.A.P.K. 75 p., 20×13 cm., prezo 4 ŝil. afr. 3p. (17 rp. aŭ 12 I.M.S.). Lingvoj

Angla-Esperanta, sed titolo kaj kolorindikoj ekskluzive en Esperanto.

Jen bonega kaj jam delonge atendata libro por la fakano. Presita sur arta papero, kun klaraj bildoj de poŝtmarkoj kaj filigranoj, en taŭga formato, ĝi estas vera konsultverko por la filatelisto. Ĝi konsistas el du partoj: la unua, kun bildoj kaj indikoj pri ĉiuj eldonitaj Britaj poŝtmarkoj, estas destinita por la ĝenerala kolektanto; la dua parto servas al la specialisto kaj donas indikojn pri ĉiaj variaĵoj de ĉiu individua marko.

En la fino de la katalogo kompetentuloj verkis artikolojn, kiuj multe helpas klarigi la mal-facilaĵojn de la Britaj poŝtmarkoj, kaj traktas la gravuritajn kaj surface presitajn eldonojn, kaj la ne-eldonitajn markojn; artikolojn, kiujn la specialisto multe ŝatos.

La ĉefa avantaĝo de ĉi tiu katalogo estas, ke la prezoj indikitaj estas *veraj* prezoj kaj ĉiu filatelisto, kiu spertis la ĉiaman problemon, kiel prezis siajn markojn laŭ iu aŭ tiu *oficiala katalogo-prezo*, certe tre alte taksos tiun novaĵon. La enkonduko de Internacia Mon-Sistemo (I.M.S.) estas alia paŝo, kiu igas la libron inda por la internaciaj interŝanĝoj kaj komerco.

Mi trovis kelkajn nebonajn formojn: paĝo 12 *kompleto el* 12 kaj p. 37 *kompleto da* 12, dum serio estas internacie konata. La indikoj ne ĉiam estas unuformaj; p. 17 *kolorigitaj literoj*, p. 19 *koloraj literoj*; kaj aliloke. Ankaŭ kelkaj preseroj enestas, sed ĉio ĉi tio estas etaĵoj en komparo kun la graveco de la verko, kaj facile evitebla en venontaj eldonoj.

Mi deziras ĉi tiun taŭgan katalogon en la manoj de ĉiu filatelisto, kaj ankaŭ niaj propagandistoj ne hezitu aĉeti ekzempleron. Kun granda intereso mi atendas la sekvontajn volumojn.

Piet Moen.

Esperanto Mluvnice a cvičebnice pro samouky a kursy (Lernolibro ĉeĥlingva por memlernado kaj kursoj). Julie Šupichová. Kvina eldono. Praha 1947. 124 p. 21×14 cm. Prezo 29 Kčs.

Lernolibro por ĉeĥlingvanoj kompilita de sperta instruistino de nia lingvo. Kvina eldono parolas pro si, kaj nia rekomendo estas nura konfirmo.

Hovoříme Esperantsky (Esperanta konversacio): Julie Šupichová. (Dua eldono). 21×14.5 cm. 132 p. Prezo 28 Kčs. Kun antaŭparolo de Prof. Miloš Lukáš.

Nia nelacigebla samideanino Šupichová kompilis manlibron por lerni la konversacion. Dek naŭ partoj, kiuj kune entenas ne malpli ol 1473 frazojn bone aranĝitajn. Nepre taŭga manlibro, rekomendinda.

* * *

Ni principe ne mencias lokajn periodaĵojn, kiuj abundas tra la mondo; sed ni deziras fari escepton pri *Esperanto*, bela gazeto sur artpapero, kun resumoj en Esperanto de ĉiu rubriko. Tio estas kluba gazeto de la grupo en Hradec Králové al kiu ni direktas sincerajn gratulojn.

Enmaniĝis al ni nekutime bela prospekto *Banejurbo Budapeŝto*, 16-paĝa informilo pri la banebloj en tiu urbo. Alloge ilustrita. Centra Komitato de la Termal-banejoj kaj Resanigejoj de Budapeŝto, Molotov-tér: 3, Budapeŝto, Hungarujo.

ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

10. En 1948 okazos en Londono la Olimpiaj Ludoj. Ĉi tiu granda internacia konkursaro signifas grandajn eblojn por nia movado. Ĉiu Esperantisto kaj precipe ĉiu FD (Propagando) nun koncentru siajn fortojn al la ĉi-subaj celoj:

11. Serĉu kontakton kun la magistrataroj, kiuj aranĝas la Olimpiajn aferojn en via lando, kaj kun la asocioj kaj kluboj, kies membroj partoprenos la Ludojn. La tempo disponebla ĝis la Olimpiaj Ludoj sufiĉas por lerni la lingvon. La Esperanto-kluboj kaj unuopaj Esperantistoj proponu instruon por la Olimpioj kaj akompanantoj.

12. Ĉiuj Esperantlingvaj radio-dissendoj menciigu la supre diritan. Aperigu tion nacilingve en la sportgazetoj, se eble, kun artikolo pri la lingvo. Loku afiŝojn en sportejoj, kluboj, ekzercoĉambroj k.s.

13. FDP, D. kaj FD-oj por sporto zorgu, ke ĉiu Esperanto-organizaĵo laŭplane komencu la supre menciitan laboron.

14. Ĉiuj Esperanto-gazetoj reprenu la enhavon de ĉi tiu rubriko kaj disvastigu la informon.

Internacia Foiro de Budapeŝto

La Internacia Foiro de Budapeŝto decidis denove eldoni prospektojn en Esperanto. Petu ĉe: Bajcsy Zsilinszky-ut. 25, Budapeŝto V, Hungarujo.

LA FAKVORTARO

Inter la pezaj armiloj en la arsenalo de nia movado apartenas la vortaroj, kaj inter ili la faka aŭ la teknika vortaro estas la plej atentinda. Ĝi havas ĉiujn atributojn de *peza armilo*: malmultnombra, komplikita kaj multekosta. Sen fakaj vortaroj ĉiu lingvo lamas kaj estas devigata prunti esprimojn el aliaj lingvoj, fenomeno konata.

La demando pri la kreo kaj eldono de fakaj vortaroj jam leviĝis en la unua tempo de nia publika aktiveco. Utilas, ke la nuna Esperantistaro sciu kio estas planita, farita, kaj kio devas esti ankoraŭ farota en ĉi tiu, ni ripetu, tre grava parto de nia agado.

Kio estas faka vortaro?

D La demando ŝajnas facile respondebla. Vortaristo scias ke determini fakan vorton ne estas simpla afero. Ĝenerale, oni akceptas la regulon ke vortoj uzataj en metioj, industrio, komerco, mallonge en ĉiuj branĉoj de la homa agado, estas fakaj. Por primitiva homo, ankaŭ por infano, *arbo* sufiĉas por ĉio kio similas arbon, dume homo pli aĝa jam scias distingi diversajn arbojn, dume arbaristo, la fakano pri arboj, faras ankoraŭ pli severan distingon. Simile okazas pri ago; ekzemple *fosi* povas havi diversajn esprimojn laŭ la metioj kiuj ekzercas tiun agon.

En tipografio, ekzemple, la ellaso de vorto en kompostaĵo estas esprimata en la Angla lingvo per *out*, en la Franca per *bourdon*, en la Germana per *Leiche*. Oni tuj konstatas ke la Angla esprimo estas objektiva. La aliaj estas bildaj (figuraj) esprimoj. Oni tial ne diru *kadavro* (Leiche) por ellasaĵo.

La elekto de fakvortoj en Esperanto devas priatenti du detalojn: la specialan karakteron de la lingvo, ĝian vortkonstruadon, kaj plie artikolon 15 de la Fundamento de Esperanto, kiu rajtigas enkonduki la tielnomatajn internaciajn vortojn.

Plenumita laboro

Jam frue oni komencis prilabori fakvortarojn, starigi listojn de esprimoj, kolekti, kompari, klasigi ilin. La iam florinta Internacia Scienca Asocio Esperantista sub la direkto de Prof. René de Saussure sisteme kaj metode sin okupis pri tio, kaj en la tiama *Scienca Revuo* oni larĝe traktis la problemon. Flanke de tio, entreprenemaj samideanoj laboris kaj eĉ eldonis vortarojn, tial ke ĝis la fino de la unua mondmilito ekzistis bela serio de fakaj vortaroj.

La Akademio Esperantista poste transprenis la kunordigan laboron por kio estis kreita la Sekcio por Sciencaj kaj Teknikaj vortaroj. Estis precize

Franca Esperantisto, M. Rollet de l'Isle, kiu senlace kaj sindone kreis bazon por la farado de tiaj vortaroj.

Inter la du militoj ĉi tiu grava laboro multe progresis, almenaŭ en la preparo. Pri la eldono de tia vortaro ekzistas nun neforigeblaj malhelpoj: faka vortaro ne estas literaturaĵo kun kelkmila eldono, relative facile vendebla. Alivorte, ĝi estas io aparta, speciala, sekve riska kaj certe deficitata. Nur danke al la oferemo de boninspiritaj personoj eldono estas ebla. La komerca sukceso estas en la plej multaj okazoj nula. Ni diru tion por kompreni la malfacilaĵojn, kiujn oni devas venki por ke aperu faka vortaro.

Arango de fakvortaro

Ekzistas diversaj tipoj de fakvortaro. La plej detala estas la enciklopedia. Ĝi donas post la fakvorto klarigon pli malpli detalan, laŭ la bezono, eventuale ankaŭ la etimologion de la vorto, kaj laste tradukojn en unu aŭ eĉ pluraj lingvoj.

Alia tipo, cetere la plej ofta, estas la nura vortlisto en Esperanto, eventuale kun nacilingva traduko. Ideala tipo estus la unua, kun detala priskribo kaj kun plurlingva traduko. Poste, por nacilingva bezono oni eldonus nacian tradukon apartan. Ĉiun vorton nacilingvan akompanus la paĝnumero kie oni trovas la ekvivalenton en Esperanto.

Kaj plej kompleta estus la fakvortaro se ĝin akompanus desegnoj, precipe se temas pri teknikaĵoj.

Eldono de fakvortaro

Ni jam diris, ke la eldono de tia vortaro estas risko pro ĝia limigita vendeblo. Nombro de niaj ekzistantaj fakvortaroj ŝuldas sian ekziston al la bonvolo de oferemaj samideanoj. (Parenteze, ankaŭ la eldono de nacilingva fakvortaro dependas tre ofte de la oferemo de individuoj!).

Feliĉa ideo aperigi fakvortaron sen tro granda kosto, certigi al ĝi aŭtomatan disvastiĝon ne per teda unuopa vendo, estis la aldono al oficiala publikigaĵo, nome la Jarlibro. Jam en la jaroj post la unua mondmilito U.E.A. provis tion, kvankam ne metode, pli malpli hazarde. Post 1939 I.E.L. publikigis tiajn fakterminarojn kun desegnoj kaj ili trafis ĝeneralan aprobon. Aparta broŝurforma represado permesas iom post iom kolekti tiajn monografiojn. Ĉi tiu materialo povos poste servi por ĝenerala faka vortaro en okazo de bezono. Ĉiaokaze, ĉi tiu arango estas la plej oportuna por konstrui fakvortaron kaj estas relative malpli multekosta ol aperigi apartan libron je eble mil ekzempleroj, kiuj

kuŝos dum jaroj en librejo. De 1940 aperas terminaroj pri: Fervojo, Armeo, Aeronautiko, Infanludoj, Radio, Muziko, Filatelo, Leĝo (Juro), Kudro kaj Triko.

La aranĝo estas laŭ la dua tipo: fakvortaro kun mallongaj klarigoj.

Ĉi tiu aranĝo havas, krom la jam citita, ankoraŭ alian avantaĝon: ne malmultaj samideanoj prilaboris fakon, kolektis, kompilis kaj... atendis, ke ilia laboro eldoniĝu. Sed vane. Kiom da bona laboro jam plenumita kuŝas ie, atendanta la tagon kiam ĝi vidos la taglumon en formo de broŝuro?

Alia avantaĝo estas la formato. Bibliotekisto, uzanto, kolektanto, ĉiuj senescepte plendegas pri la malsamo de formatoj laŭ kiuj aperis niaj fakvortaroj. Tio ne estu riproĉo kontraŭ la oferemaj verkintoj aŭ eldonistoj, sed nur konstato pri la hazardo laŭ kiu la plej multaj fakvortaroj aperis. (Ni esceptas kvar modelajn vortarojn, nome, la Arkitekturan, Komercan, Medicinan kaj la Filozofian, kiuj krom bonega enhavo estas same bone vestitaj).

Konkludo

Estas dezirinde, ke U.E.A. povu daŭrigi la sisteman aperigon de fakvortaroj pere de la Jarlibro. Eventuale, oni povus presigi eĉ pli grandan, sed tio estas afero dependanta de materialo kaj de financoj. Oni povus eĉ iam eldoni konkordancon en naciaj lingvoj kun indiko pri la konkernata vorto en Esperanto.

Alia demando estas, ĉu el la jam aperintaj fakvortaroj iuj ne povus esti reeldonataj sammaniere, t.e. en la Jarlibro, ĉar iuj el tiuj fakterminaroj tute malaperis, malmoderniĝis, aŭ eble aperis laŭ neoportuna formato. Estas dezirinde, ke U.E.A. studu ĉi tiun detalon kaj pripensu la eblon revivigi tiun dormantan terminaron.

Samideanoj, kiuj deziras kunlabori je kompilo de fakvortaroj, bonvolu sin anonci al ni (Geneva oficejo), kaj ni informos pri la procedo. En venonta numero de ESPERANTO ni priskribos en facile legebla formo la aperintajn fakajn, sciencajn kaj teknikajn vortarojn.

H.J.

Optimismo de generalo

Generalo Eisenhower en kunveno de kelkmil studentoj en Edinburgh deklaris: Estas mia firma konvinko, ke venos la tempo en kiu la civilizacio igos homojn de mia profesio senokupaj. Estas mia konvinko, ke la lernejoj de la estonteco anstataŭos la armeojn. La mondo povas esti direktata, ĉu de soldatoj, ĉu de ŝtatviroj—sed ne de ambaŭ samtempe!

Raporto pri provoj enkonduki Esperanton en sciencaj gazetoj en Nederlando

Jam dum du jaroj oni faras klopodojn por akiri enkondukon de Esperanto en Nederlandaj sciencaj gazetoj. Post la alvoko al la kemiistoj-Esperantistoj (en *Esperanto Internacia* Marton 1946) nia samideano W. P. Roelofs verkis artikolon en *Chemisch Weekblad* kun titolo *Al unulingveco en la scienca interkomunikado*. Ĝi estis subskribita de 8 Nederlandaj kemiistoj, inter kiuj Prof. D-ro A. F. Holleman. Sekvis aprobaj kaj malaprobaj reagoj. Oficiala peto al la redakcioj allasi Esperanton ne havis sukceson. S-ro Roelofs faris informpeton inter ĉirkaŭ 120 Nederlandaj kemiistoj. Ĉirkaŭ 15% de la demanditoj estis por allaso de originalaj Esperantlingvaj artikoloj; ĉirkaŭ 30% por aldono de Esperantlingvaj resumoj al ĉiuj artikoloj, kaj ĉirkaŭ 65% por allaso de tiaj resumoj. En Novembro pasinta D-ro Nijveld kaj S-ro Roelofs defendis la proponojn faritajn en la nomo de kvindekda Nederlandaj kemiistoj en kunveno de la *Konsilantaro de Interkonsiliĝo* de la Nederlanda Societo Kemiista, kiu per 22 voĉoj kontraŭ 1 konsilis allasi en la *Recueil des Travaux Chimiques des Pays-Bas* kaj en la *Chemisch Weekblad* resumojn en kiu ajn nacia lingvo aŭ en Esperanto. La estraro proponis tion al la ĝenerala membrokunveno. La unua voĉdonado rezultigis 39-39; revoĉdono 45 por, 48 kontraŭ. Provizore ni do perdis la batalon pri la unua etapo, parte pro tio, ke ĉar la sukceso jam ŝajnis certa, preskaŭ ĉiuj publikaj subtenantoj de la proponoj pri Esperanto forrestis de tiu kunveno. Tio instruas, ke ni ne forlasu la batalkampon antaŭ ol la venko estas definitiva.

Tamen, ankaŭ sukceso estas raportebla. Prof. Holleman, nestoro de la Nederlandaj kemiistoj, sukcesis decidigi la Matematikan kaj Natursciencajn Sekciojn de la Reĝa Nederlanda Akademio de Sciencoj allasi Esperantlingvajn resumojn en siaj *Proceedings* (Traktaĵoj). Ekzistas diversaj signoj, ke la lingva problemo vivas ĉe pluraj sciencistoj en Nederlando.

W. P. Roelofs.
W. J. Nijveld.

La voĉo de danko

Sinjorino Manjo Gernsbacher, organizintino de la Kolonja Kongreso en 1933, nun en Jerusalemo, plej kore dankas al Hans Jakob, Estrarano de U.E.A. en Ĝenevo kaj al Direktoro Buchli en Berno pro altvaloraj konsiloj kaj helpo okaze de ŝia vojaĝo al Germanujo, Oktobron, 1947.

S-ro Alberto Martini en Firenze petis esprimi sian dankon al Friedrich Helfers, Karlsruhe, Germanujo: "Sen persona aŭ aĉetebla intereso donis al malsana ne-Esperantisto tutan kuracadon—ne troveblan en Italujo—por eviti gravan operacion ĉe la cerbo. Vera pruvo de universala kunfrateco."

KIO ESTAS GENIO ?

Kiam antaŭ kvardek jaroj mi komencis studi Esperanton, mi baldaŭ trovis en la Esperanta literaturo la opinion pri la verko de D-ro Zamenhof. Oni nomis ĝin *genia*.

Post kelkaj jaroj mi trovis en la libro franc-lingve verkita, *La historio de la lingvo universala* noton, kiun la aŭtoroj, rivaloj de D-ro Zamenhof, nevolonte, preskaŭ kontraŭ sia volo, devis enmeti, ke laŭ la opinio de fakanoj oni devas rekoni la lingvan genion de Zamenhof.

Tiam tamen, preskaŭ antaŭ duono de jarcento, kiam la artefarita lingvo estis strangaĵo, la vorto *genia* estis iom bombasta. Tiom da projektoj de artefarita lingvo jam aperis, kaj ĉu en la tiama societo *Espero*, kies membro mi estis, mankis la *geniuloj*, kiuj havas propran projekton simile *genian* kiel Esperanto ?

Lessing skeptike rimarkigis, ke *esti konsiderata kiel geniulo dum sia vivo, aŭ kvindek jarojn post sia morto, ne estas tro certa pruvo pri genio*. La kreaĵo de D-ro Zamenhof ne povas timi—ĝi eltenos pli longedaŭran pruvon. Poste tamen, kiam mi volis kontroli, kio do estas genio, mi multe serĉis en libroj kaj enciklopediaj vortaroj la difinon de ĉi tiu vorto, kaj ĉie renkontis ne sufiĉe plenan aŭ neprecizan ĝian klarigon. Ekzemple en *Plena Vortaro de Esperanto* la dua difino estas *superega inteligento* ; sed la vorto *inteligento* laŭ la sama vortaro signifas nur *facile komprenanta kaj vikle pensanta*.

Dum la teruraj jaroj de la germana teroro mi ofte kaŝiĝis en la grandega biblioteko de la Universitato en Varsovio penante deŝiri min de la malgaja realo. Unufoje, serĉante ion en la ruslingva enciklopedia vortaro, eldonita en la komenco de la nuna jarcento, mi trovis plenan difinon de ĉi tiu vorto, kiu ŝajnis al mi la plej ĝusta inter la ĝis tiam trovitaj.

En la komenco la aŭtoro de la artikolo rimarkigas, ke genio—la plej alta grado de ĝeneralaj aŭ specialaj kapabloj—ne estas uzata en ĉiuj aŭ pluraj formoj de la mensa funkciado. La homa naturo ne povas kunigi ĉion, kaj nur tre maloftaj individuoj, kiaj ekzemple Miĥael Anĝelo aŭ Leonardo da Vinci, havis la genion en pluraj kreadformoj. Malpli ofte oni renkontas fenomenon de genio en la scienco kaj la praktika vivo. Geniulo, laŭ la aŭtoro, preskaŭ ĉiam estas pli-malpli unuflanka ; pli ofte li estas—ekster sia specialaĵo—eĉ mezinteligenta kaj penslimigita.

La aŭtoro dividas la tipojn de genio : teoria—en la regiono de scienca laboro, filozofio, historio, matematiko ; genio en la arto ; genio praktika—kiu sin montras en supereco rilate la eksterajn

fortojn de la naturo, kaj fine : regna genio—kapablo de organizo de homaj interrilatoj.

Aparta demando estas la diferenco inter genio kaj talento. Laŭ la aŭtoro genio estas antaŭ ĉio originaleco. Genio verkas ion tute novan, ĝi solvas la problemojn antaŭe ne solvitajn. La geniulo donas tute novan enhavon kaj celojn al la pensoj kaj aspiroj de sia jarcento, kreante novan epokon. La talento, kontraŭe, agas en la sfero de jam ekzistantaj tipoj kaj metodoj. Geniuloj ĝuste al la talentuloj donas la impulson kaj materialon por ties laboro.

Karakteriza estas la metodo de ilia verkado. Talenta homo verkas konscie ; li scias kiamaniere kaj kial li atingas tian aŭ alian rezulton. Li mem elektas la rimedojn por atingi la celon. Geniulo, kontraŭe, kreas subkonscie, kaj kreante novan ideon li akiras ĝin kvazaŭ okaze kaj senpere.

La talento elvolviĝas kaj plifortiĝas per ekzerciĝo kaj diligento. La genio aperas kun forta impulso kaj instinkto, eĉ spite al ĉiuj malfavoraj cirkonstancoj.

Geniaj ideoj estas pli larĝaj kaj pli superaj ol la ideoj de samtempuloj. La kreado de geniulo ofte estas neordinara, kaj tial la homoj ne facile komprenas geniulon kaj proklamas lin frenezulo.

Certe estas, ke en frenezo iafoje sin montras la briletoj de la penso aŭ de poeziemo, sekve de la pligrandigita ekscito de la nerva sistemo, kiun oni povas observi ĉe geniuloj ; sed sufiĉas memori, ke la plimulto de geniaj homoj estis tute sanaj, fizike kaj psike, por kompreni, ke la kunligo de genio kun *nervozo* ne estas tre prudenta faro.

Por ilustrati la aferon pri unuflankeco de la genio mi povas citi du ekzemplojn el mia propra sperto. Antaŭ la unua mondmilito mi konis du junulojn, kiuj estis markitaj de genio. Ambaŭ reprezentis la arton. Unu estis genia baleta artisto kiu jam ne vivas. Li mortis en frenezulejo. La alia—genia violonisto—nun vivas en Usono, griza maljunulo, kaj oni ĉiutage aŭdas la geniajn tonojn de lia violono fluantaj per gramofondiskoj tra la aero.

Ambaŭ geniuloj estis unuflankaj. Neniu el ili posedis eĉ malgrandan kvanton da inteligento, se ni akceptas la difinon de tiu vorto en P.V. La unua kaŝis sian unuflankecon per evito de la danĝeraj rifoj dum mensaj interrilatoj kun homoj intelligentaj. La dua, male, provis superi aliajn homojn, ofte renkontante mokojn kaj eĉ ridojn.

La leganto eble demandos, ĉu D-ro Zamenhof ankaŭ estis geniulo unuflanka ? La respondo li povas trovi en la konata verko de Edmond Privat *Vivo de Zamenhof*, precipe en ĝiaj tri ĉapitroj *Lingvisto, Verkisto, Etika Pensulo*.

R. Sakowicz, Polujo.



DUA INFORMILO

Adreso por leteroj : 33a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

La kongresa oficejo ĝis la kongreso : Kamrergatan 3, Malmö, Tel : 38081.

Somera Universitato. En la kadro de la 33a Universala Kongreso de Esperanto LKK aranĝos Someran Universitaton. LKK volonte akceptos proponojn pri famaj, talentaj prelegistoj el diversaj landoj kaj por diversaj temoj. La prelegejo taŭgos por bild- aŭ film-montrado. LKK rezervas al si la rajton decidi pri la akcepto de la prelegistoj proponitaj.

La fak-organizaĵoj estas petataj tuj serĉi kontakton kun LKK proponante tagordon de la kunsidoj. La organizaĵoj mem decidis pri la tagordo, sed LKK estas preta fari ĉion eblan por la kunsidoj. LKK petas, ke ĉiu fak-organizaĵo proponu minimume unu prelegon de eminentulo en la kadro de la kunsidoj. Tiaj prelegoj eĉ povas okazi sub la ĝenerala nomo de Somera Universitato. La ĉefa afero estas, ke ni donu al la specialaj fak-kunsidoj kiel eble plej indan kadron kaj valoran enhavon. Ni atendas rapidan sciigon de la diversaj organizaĵoj.

Kongreskotizoj :

	Ĝis 31 Marto	Poste
Kongresano	sv. kr. 25	30
Edzo aŭ edzino de kongresano	„ „ 15	20
Junul(in)o, ne pli ol 20-jara	„ „ 10	15

Kiel pagon por la kongreskotizo ni akceptas nek poŝtmarkojn nek internaciajn respondkuponojn, kaj nek iajn varojn.

Al informpetoj bonvolu aldoni internacian respondkupono.

Glumarkoj : Mendu kaj uzu kongresajn glumarkojn. Por sv. kr. 0,30 aŭ unu internacia respond-kupono vi ricevos 15 glumarkojn.

Donacoj helpas sukcesigi la kongreson ; la LKK antaŭdankas al donacoj.

Blinduloj. La blindulo kaj lia gvidanto ricevas senpagan kongreskarton ĝis la fino de marto ; poste ili devos pagi kongreskotizon po sv. kr. 5 :—La aliĝilo de blindulo devas esti subskribita de blindula organizaĵo, aŭ de okulkuracisto.

Blindula kaso. Helpu al blinduloj la kongresviziton. La LKK antaŭdankas akceptas donacojn por tiu kaso.

Kongresa numero. Ni petas vin skribi ĉiam vian kongresan numeron sur la leteroj, poŝtkartoj, kaj kiam vi sendas monon. Tio estas tre grava por ni.

Libertempa interŝanĝo de loĝejo. Ĉiu Esperantisto en Malmö jam invitis iun por loĝi en sia hejmo dum la kongreso. Do, estas vane skribi por demandi ĉe LKK.

Loĝejo : Ni petas ĉiujn kongresanojn tuj mendi loĝejon. Se vi venos tien ĉi sen ia antaŭmendo, vi certe ne trovos lokon por tranokti, ĉar la urbo estos plenplena de vizitantoj al la Skania Foiro, kiu okazos samtempe.

La mendo de ĉambro en hotelo kaj ĉe privatulo devas esti antaŭpagita. Mendo sen mono ne validas.

La mendon de lito en la amasrestejo en lernejo vi povos pagi poste, plej frue post la alveno, sed vi devas nepre mendi baldaŭ.

Tendarejo. Tendoj lueblaj por sv. kr. 1.50 por unu nokto. La tendarejo estas senpaga. Ĝi troviĝas en Ribersborg ĉe la marborda banejo en distanco de 2 km. de la kongresejo. Tramlinio troviĝas inter la kongresejo kaj la tendarejo. La bileto kostas sv. kr. 0,20 por unu vojo.

Ekskursoj. Ni petas vin tuj mendi viajn ekskursojn dum la kongreso.

Postkongresaj aranĝoj : La svedaj fervojoj plialtigis de la 1-a de Februaro 1948 ĉiujn vojaĝprezojn. Pro tio vi devos alkalkuli 20% al ĉiuj niaj menciitaj prezoj pri la postkongresaj aranĝoj en la unua informilo.

Sciigo pri la nomo de la hotelo aŭ privatulo ĉe kiu vi loĝos dum la kongreso estos sendata al vi je la fino de Junio aŭ en Julio.

Kvitanco pro ricevita mono por loĝejo kaj ekskursoj estos sendata al ĉiu frusomere.

Aliĝoj : Ĝis la 31-a de Januaro 1948 aliĝis 811 personoj el 25 landoj.

4-a Listo de Kongresanoj

442. F-ino Lina Klee, St. Gallen, Svisujo
443. S-ro V. Vurm, Ĉ. Budějovice, Ĉeĥoslovakujo
444. S-ino M. Vurmová, (edzino)
445. F-ino Ruth Wallin, Askersund, Svedujo
446. F-ino Ragnhild Ahl, Borås, Svedujo
447. S-ro Fritz Lindén, Töreboda, Svedujo
448. F-ino Viola Karlsson, Älvsjö, Svedujo
449. S-ro Josef Mandel, Malmö, Svedujo
450. S-ro Olov Svärd, Östersund, Svedujo
451. S-ino Siri Svärd, (edzino)
452. S-ro A. Johansson, Genevad, Svedujo
453. S-ro Gunnar Svärd, Laholm, Svedujo
454. S-ro Elof Hörstedt, Klagerup, Svedujo
455. F-ino Elsa Nyberg, Stockholm, Svedujo
456. S-ino A. Runerheim, Malmö, Svedujo
457. S-ro C. B. Nilsson, Göteborg, Svedujo
458. S-ro Tore Johansson, Kalmar, Svedujo
459. S-ino S. Johansson, (edzino)
460. S-ro K. Sand, Falköping, Svedujo
461. S-ino F. Sand, (edzino)
462. F-ino A. Kindahl, Linköping, Svedujo
463. S-ro H. Sjöberg, Gnosjö, Svedujo
464. S-ro P. A. Persson, Göteborg, Svedujo
465. F-ino C. E. Holmblad, Karlskoga, Svedujo
466. S-ro A. Månsson, Hälsingborg, Svedujo
467. F-ino I. Karlsson, Bofors, Svedujo
468. S-ro K. Håkansson, Malmö, Svedujo
469. S-ino I. Åkesson, Malmö, Svedujo
470. S-ro B. Eriksson, Stockholm, Svedujo
471. Rezervita
472. F-ino S. Boström, Örebro, Svedujo
473. S-ro H. Nordling, Kil, Svedujo
474. S-ino E. Nordling, (edzino)
475. S-ro Karl-Johan Lundberg, Malmö, Svedujo
476. S-ino M. Lundberg, (edzino)

477. S-ro A. Arton, Vollsjö, Svedujo
478. S-ro G. Erikson, Örebro, Svedujo
479. S-ino K. Erikson, (edzino)
480. S-ro Ivar Runfeldt, Hagfors, Svedujo
481. S-ro E. Erlandsson, Malmö, Svedujo
482. S-ino H. Erlandsson, (edzino)
483. S-ro E. Nilsson, Häkanryd, Svedujo
484. F-ino J. Waldner, Esztergom, Hungarujo
485. S-ro J. Lönn, Eksjö, Svedujo
486. S-ro G. Gustafsson, Örebro, Svedujo
487. S-ro Sven Sundin, Växjö, Svedujo
488. S-ino B. M. Sundin, (edzino)
489. S-ro S. Engholm, Ludvika, Svedujo
490. S-ino O. Engholm, (edzino)
491. S-ro F. A. Vadfors, Kvarnsveden, Svedujo
492. S-ro C. Larsson, Sala, Svedujo
493. S-ro R. Pehrsson, Stockholm, Svedujo
494. S-ino M. Pehrsson, (edzino)
495. S-ro D. Lundqvist, Vamlingbo, Svedujo
496. S-ino H. Kling, Malmö, Svedujo
497. S-ro E. Lindberg, Borås, Svedujo
498. S-ro A. Hermansson, Uddevalla, Svedujo
499. S-ro B. Asp, Stockholm, Svedujo
500. S-ro D. Green, Malmö, Svedujo
501. F-ino D. Green, Malmö, Svedujo
502. F-ino E. Andersson, Hälsingborg, Svedujo
503. S-ro G. Ljunggren, Klippan, Svedujo
504. S-ino G. Ljunggren, (edzino)
505. S-ro B. Wallin, Falun, Svedujo
506. S-ro B. Löfqvist, Visby, Svedujo
507. S-ro L. Löfqvist, Visby, Svedujo
508. S-ro E. Halvars, Linghed, Svedujo
509. S-ro M. Jansson, Borlänge, Svedujo
510. S-ino M. Jansson, (edzino)
511. S-ro Y. Lidbo, Karlskoga, Svedujo
512. S-ro H. A. Leijder, Karlskoga, Svedujo
513. S-ino A. Kuld-Leijder, (edzino)
514. S-ro K. Bengtsson, Krylbo, Svedujo
515. S-ro B. Sjöberg, Avesta, Svedujo
516. S-ro V. Henriksson, Avesta, Svedujo
517. S-ro H. Berglund, Avesta, Svedujo
518. S-ino F. Falk, Ångby, Svedujo
519. F-ino A. Bjurman, Borlänge, Svedujo
520. S-ro A. Bergsten, Västerås, Svedujo
521. S-ro P. Almén, Hällefors, Svedujo
522. S-ro H. A. Leyden, Höör, Svedujo
523. S-ino C. M. Leyden, (edzino)
524. S-ro A. Carlin, Trollenäs, Svedujo
525. S-ro H. Ysner, Hällevik, Svedujo
526. S-ino H. Ysner, (edzino)
527. F-ino G. Ysner, (filino)
528. F-ino H. Ysner, (filino)
529. S-ro I. Nordin, Årjäng, Svedujo
530. F-ino W. Hansson, Strömsbro, Svedujo
531. S-ro E. Jönsson, Vilshult, Svedujo
532. S-ro E. Martinsson, Vilshult, Svedujo
533. S-ro G. Berg, Vilshult, Svedujo
534. S-ro P. Berg, Vilshult, Svedujo
535. S-ro K. Olofsson, Olofström, Svedujo
536. F-ino A. L. Källgren, Stockholm, Svedujo
537. S-ro Å. Ahlén, Stockholm, Svedujo
538. F-ino S. Händel, Stocksund, Svedujo
539. S-ro A. Fridén, Falköping, Svedujo
540. F-ino G. Johansson, Gudhem, Svedujo
541. S-ro H. Carlsson, Falköping, Svedujo
542. S-ino E. H. K. Carlsson, (edzino)
543. S-ro F. H. Turner, Hackefors, Svedujo
544. S-ino E. J. Turner, (edzino)
545. S-ro A. Johansson, Borås, Svedujo
546. S-ro M. Berggren, Hissjön, Svedujo
547. F-ino M. Andersson, Norrköping, Svedujo
548. F-ino M. Arnroth, Norrköping, Svedujo
549. F-ino E. Tibbling, Norrköping, Svedujo
550. F-ino I. Lövgren, Norrköping, Svedujo
551. F-ino D. Lindroth, Norrköping, Svedujo
552. S-ro G. Aronsson, Norrköping, Svedujo
553. S-ino A. Aronsson, (edzino)
554. S-ro S. Ragnar, Norrköping, Svedujo
555. S-ro N. Johansson, Norrköping, Svedujo
556. F-ino I. M. Petersson, Åby, Svedujo
557. S-ro H. Wiklander, Norrköping, Svedujo
558. S-ro C. Lindberg, Norrköping, Svedujo
559. S-ino A. Lindberg, (edzino)
560. S-ro E. Gustafsson, Norrköping, Svedujo
561. S-ro A. Kenndal, Norrköping, Svedujo
562. S-ino I. Kenndal, (edzino)
563. S-ino I. Svensson, Mälarhöjden, Svedujo
564. F-ino H. H. Selonen, Helsinki, Finnlando
565. S-ino A. Parko, Somero, Finnlando
566. F-ino T. T. Palomäki, Helsinki, Finnlando
567. S-ro Stefano La Colla, Milano, Italujo
568. S-ro M. Munch, København, Danujo
569. S-ino T. Hammarlund, København, Danujo
570. S-ro A. Lovati, Milano, Italujo
571. F-ino G. M. Dew, Dalby, Svedujo
572. S-ro T. A. Goldman, Rotterdam, Nederlando
573. S-ino F. Goldman, (edzino)
574. S-ro E. Keiser, Bern, Svisujo
575. S-ro K. Burghold, Bern, Svisujo
576. S-ro A. Stücheli, Fribourg, Svisujo
577. F-ino M. A. Stücheli, Fribourg, Svisujo
578. S-ro H. Noll, Dietlikon, Svisujo
579. S-ro P. Hübner, Köln—Dellbrück, Germanujo
580. S-ro Lanoux, Alés, (Gard), Francujo
581. S-ino M. L. Lanoux, (edzino)
582. S-ro K. Ullström, Caen, Francujo
583. S-ino J. Morin, Caen, Francujo
584. F-ino R. Cherpeau, Vouvray, Francujo
585. F-ino M. H. Vermaas, Rotterdam, Nederlando
586. S-ro J. U. Hommes, Apeldorn, Nederlando
587. S-ro P. Rosa, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo
588. F-ino M. Rosová, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo
589. S-ino E. Hartlová, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo
590. Rezervita
591. Rezervita
592. S-ro P. Lilkov, Sofio, Bulgarujo
593. S-ro B. Fygle, Bodø, Norvegujo
594. S-ro E. Hunstad, Bodø, Norvegujo
595. F-ino G. Hunstad, Bodø, Norvegujo
596. F-ino G. Normann, Bodø, Norvegujo
597. F-ino A. C. Nilsson, Bodø, Norvegujo
598. F-ino E. A. Pedersen, Bodø, Norvegujo
599. S-ro M. Myrvoll, Bodø, Norvegujo
600. S-ro E. M. Akerø, Bergen, Norvegujo
601. S-ro K. Boström, Bergen, Norvegujo
602. S-ino L. Christensen, Bergen, Norvegujo
603. S-ro I. Blikstad, Trondheim, Norvegujo
604. S-ino M. Blikstad, (edzino)
605. S-ino G. Tomtan, Trondheim, Norvegujo
606. S-ro R. Rian, Trondheim, Norvegujo
607. S-ro E. Westerheim, Narvik, Norvegujo
608. S-ro G. Ringstad, Fredikstad, Norvegujo
609. S-ro H. Fridén, Halden, Norvegujo
610. S-ro R. Horrisland, Mosby, Norvegujo
611. S-ro S. Brantsäter, Aker, Norvegujo
612. S-ro T. Müller, Jørpeland, Norvegujo
613. S-ino H. Müller, (edzino)
614. S-ro O. Andersen, Sauda, Norvegujo
615. S-ro R. Rødsaa, Sauda, Norvegujo
616. S-ro A. Bjerke, Sauda, Norvegujo
617. S-ro J. B. Malmkvist, Sauda, Norvegujo
618. F-ino G. Aubert, Châlons-sur-Marne, Francujo

ENIGMA KONKURSO N-ro 25

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurso N-ro 23 :

N-ro 52 : nenio – tenio – tendo – mendo – mondo. Valso – valvo – volvo – polvo – polko. Hundo – hurdo – kurdo – kordo – korto – vorto – volto – volvo – vulvo – vulpo. Gloro – ploro – ploto – pleto – poeto – ponto – honto. Slavo – klavo – klabo – knabo – knaro – anaro – analo – anglo. Lanco – lando – bando – bendo – pendo – pento – ponto – poeto – preto – preso – pruso – pluso – plumo. Tablo – kablo – karlo – kardo – bardo – bando – bendo – benko. Kabano – kabalo – kanalo – banalo – batalo – batato – patato – palato – palaco.

N-ro 53 :

filino
avo }
avino } filino
 } bofilo } filino

N-ro 54 : El ^{EN}_N oni povas legi dufoje EN ; se oni aldonas la literon I, ĉiu EN donas dufoje ENI, la nombro do duobliĝas. Se oni aldonas la literon G, ĉiu ENI donas dufoje ENIG, la nombro do ree duobliĝas. Tiel daŭrigante oni legas en la duono de la figuro 8192 fojojn ENIGMAKONKURSO. La alia duono donas la saman nombron ; oni komencu ĉe la 0 dekstre sube. La tuta nombro do estas 16384.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 21-a konkurso : S-ro M. Rétot (Fr.) 96p, S-ro J. Heerdink (Ned.) 94p, Pastro D. W. Robson (Brit.) 94p.

Enigmo N-ro 57 : Krucvort-enigmo.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A												
B												
C												
D												
E												
F												
G												
H												
I												
K												
L												
M												

Horizontale :

- A. 1. Tia estas Winston Churchill.
B. 1. Oni tre ŝatas, ke infanoj faru tion ; 5. Grupo da sportistoj ; 10. Ĉiu korespondanto devas scii tion (r).
C. 1. Neatenti ; 9. Tiel militista soleneco kiel aktuala teatraĵo (r).
D. 1. Malgranda batalilo ; 8. Virina eco (r).

- E. 1. Ĥemia elemento (r) ; 5. Plilongigilo de paŭlo.
F. 2. Resenda pronomo ; 5. Maristoj timas ilin.
G. 2. Deviga restado en izolita loko.
H. 2. Ŝirmejo ; 6. Birdo el ordo de pasero.
I. 1. Ĝenerala programo ; 11. Persona pronomo.
K. 1. Nepre bezonata por kavaleriistoj ; 6. Ĝi publikigis novan projekton pri mondlingvo ; 10. Trinkajo (r).
L. 1. Ideala modelo ; 5. Estas ĉiam ĝoje akceptataj de komercistoj.
M. 1. Participa finaĵo ; 3. Tersurfaco ; 8. Korpoparto.

Vertikale :

1. A. Unuo de nesamspecaj partoj.
2. A. Alta ŝtona monumento ; I. Peni ne renkonti iun (r).
3. A. Tia rezultato estas malagrabla ; I. Birdetoj faras tian bruon.
4. A. Birdeto simila al pasero ; G. Ekzemplo de obstineco.
5. A. Malgrande ; D. Blanka malmola substanco ; I. Anagramo de unu el la kvar koloroj de ludkartoj.
6. A. Tia vojo estas plej mallonga ; F. Ĝardeno purigilo.
7. A. Ofte uzata en hospitalo ; E. Adverbo ; H. Anagramo por io kion faras la papuoj.
8. A. Ŝatata persono ; G. Kostas multe da tempo por virinoj (r).
9. A. Anagramo por ceremonia seĝo ; F. Necesa por vivi (r) ; I. Vivas en akvo, el akvo kaj eĉ sur arboj.
10. A. Pensaĵo (r) ; D. Rezinoriĉa ligno (r) ; H. Mallonga resumo (r).
11. A. Maljunulo kiu staras surkape (r) ; C. Oni ofte faras ĝin ĉe ĉevalkurado ; H. Nepre bezonata por maŝinoj.
12. A. Se oni havas ĉiujn oni gajnas ; G. Sportejo.
Ĉiuj vortoj komenciĝas kaj finiĝas ĉe dika linio.

Enigmo N-ro 58 : Iu venis ĉe juvelisto kun rompiĝinta ora ĉeno. La ĉeno rompiĝis en ses pecojn kaj ĉiu peco konsistis el kvar ĉeneroj. Se la kliento devos pagi 10 frankojn por la malfermo kaj rea lutfermo (kune) de unu ĉenero, kiom li devos minimume pagi por la riparo de la ĉeno ? Bonvolu klarigi vian respondon. (Ensendis S-ro v.d. Broek, Ned.).

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Acien Atencia—Al Ge-sroj Acien Atencia, Casablanca, Maroko, je la 27a de Novembro 1947, naskiĝis filo, nomita Julio.

Kalmanowicz—Al Ge-sroj I. Kalmanowicz, Piotrolesie, Polujo, je la 22a de Julio, 1947, naskiĝis filo, nomita Franklin.

Ohana—Al Ge-sroj Ben Sion Ohana, Marrakech, Maroko, je la 24a de Decembro 1947, naskiĝis filo nomita Ludoviko Lazaro.

Niaj Mortintoj

Amali—Forpasis Zvi Amali, membro en Jerusalemo, mortigita de Araboj je la 30a de Decembro 1947.

Chinery—Forpasis subite la 5an de Januaro 1948, post mallonga kormalsano, F-ino Florence H. Chinery, Ipswich, Anglujo, 62 jaraĝa.

Follaets—Forpasis je la 27a de Decembro 1947 nia membro Robert Follaets, en Antwerpen, Belgujo.

Michaelis—Julius Michaelis, longtempa delegito de UEA en Magdeburg, rifuĝinta en Anglujo, mortis en Oktobro 1947 en Londono.

Steiner—Mortis je la 4a de Januaro 1948 pro akcidento Hugo Steiner, 40 jaraĝa filo de nia energia aganto Kortega Konsilanto Steiner.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 203

3an de Februaro 1948

NOVAJ DELEGITOJ

Angolo

Teixeira de Sousa. D : F. Mendes Costa.
FD (Doganaj aferoj) : La D.

Britujo

Carshalton (Surrey). D : A. Venture, 11 Colston Avenue.

Ĉeĥoslovakujo

Hartvíkovice. D : Fr. Sedláček, Hartvíkovice n-ro 142,
poŝto Námešť n/Osl.

Karlovy Vary. FD (Junularo) : Fr. Mašek, Třída krále
Jiřího 17. Tel : 3688.

Plzen. D : Fr. Kavan, Benešova 93, Plzen II.

Udol sv. Kryštofa. D : Konstantin Koutek, Udol sv.
Kryštofa ĉe Liberec.

Egiptujo

Cairo. VD : A. Kélada, Ste. An. des Eaux du Caire
(Boulac).

FD (P.T.T.) : Amin El Mofti, 27 Rue Haider Pacha,
Helwan. Tel : 53218.

FD (Studentaj aferoj) : Said Saleh, Str. Fuad, Str.
Al-Iskandarani 6, Shubra.

Finnlando

Porvoo. FD (Felbestoj) : N. A. Laine, Pappilanmäki 7.

Turku. FD (Instruado) : S-ino K. Talonen, Uudenmaank.
10. A. 1.

Germanujo

Frankfurt a/Main. D : A. Timpe, Leverkuserstr. 16,
Ffm.-Höchst. Tel : 12104.

VD : D-ro J. Kreutzer, Karl Stielerstr. 4. Tel : 52104.

FD (Framasonismo) : C. Barthel, Woehlerstr. 14-II.

FD (Instruado) : La VD.

Freiberg Sa. D : E. Hölscher, 10 Sachsenhofstr., (10a)
Freiberg, Sa.

VD : K. Nendel, August-Bebel-Str. 17.

FD (Ĉe-metoda instruado) : La VD.

FD (Fervojo) : M. Eichhorn, Bahnhofsgebäude,
Westflügel.

Marburg i. L. D : H. Weiershäuser, Steinweg 28.
FD (Turismo) : La D.

Niedermarsberg. D : F. Schneider, Hauptstr. 33, (21b)
Niedermarsberg. Tel : 252.

Schweinfurt. D : B. Zenker, (13A) Forst bei Schweinfurt,
Nr. 26.

Wiblingwerde. D : F. Wangnet, (21b) Wiblingwerde,
Kreis Altena, Westfalen. Tel : Altena 2538.

FD (Literaturo) : La D.

Hungarujo

Monor. D : L. Böti, Petöfi str. 3.

Pestszentlőrinc. D : I. Gulyás, Némethy Jenő u. 60.

Italujo

Torino. D : D-ro E. Aprosio, via Morghen 34. Tel :
74554.

VD : C. Borione, Via Saluzzo 44. Tel : 63437.

FD (Scienco) : La D.

Madejro

Funchal. FD (Konsulaj aferoj) : C. Andreasen, Rua do
Carmo 7. Tel : 485.

Maroko

Casablanca. FD (Mekaniko) : J. Acien Atencia, 316 Bd.
d'Anfa.

Nederlando

Adorp. D : F-ino A. Brill, Torenweg 65.

Slidrecht. D : F-ino J. H. P. Van Ouwerkerk,
Stationsweg 18.

Norvegujo

Hamar. D : S-ino E. Koller, Skappelsgt. 1.

Nov-Zelando

Auckland. VD : C. W. Brandon, 16 Wairiki Road,
Mt. Eden, S.1. Tel : 61-183.

Polujo

Myslowice. D : E. Tomczyk, ul. Wielka-Skotnica 115.

Rzeszów. D : J. Kucharz, Bernardynska str. 6.

Warszawa. D : B. Monkiewicz, Pl. Inwalidów 3 m. 56.
Tel : 86962.

FD (Skoltismo) : R. S. Wozniak, Lazienkowska 7,
Z.H.P., Warszawa I. Tel : 85-618.

Rumanujo

Mănăstiu. D : S-ino Zsófia Tóth.

Svedujo

Angby. FD (Konstruado) : K. J. Moberg, Angantyrsvägen 17, Ångby 1. Tel : 37 03 05.

Höviksnäs. D : G. Åsemyr, Hammars skola. Tel :
Hjälteby 49.

Linköping. FD (Ĵurnalismo) : C. H. Johanson, Redakcio
de Östgöten. Tel : 21166.

Örebro. FD (Sindikataj aferoj) : G. A. F. Loman,
Rynningegatan 25.

Stockholm. FD (Filatelo) : L. L. Landin, Alströmergatan
32/IX.

Svisujo

Boudry. D : R. Frochoux, Rue Louis Favre 52. Tel :
G. 40. 17.

Usono

Meadville (Penna.). D : Conrad Fisher, R.F.D. 1.

Milwaukee (Wis.). D : A. Nabby, 133 West National
Avenue. Tel : Orchard 0958.

Orlando (Florida). D : Robert Blackstone, B-217,
Orlovista. Tel : 9486.

Piney Flats (Tenn.). D : O. H. Cross, Arthur Carr's Store.

Rolla (Miss.). D : J. M. Brewer, 1200 Pine Street. Tel :
407 W.

Waterman (Penna.). D : L. Obreczián, Box 51.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

F-ino H. Winberg-Edvall, Alfta, Svedujo.

S-ino T. Winberg-Rosell, Bengtsfors, Svedujo.

S-ro G. G. Choutoff, Maabarot, Palestino.

PATRONOJ 1948

13. S-ro C. H. Toms, Freshwater, Anglujo.

14. D-ro R. H. Crowley, Welwyn, Anglujo.

15. S-ino H. Aspin, Lower Hutt, Nov-Zelando.

16. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.

17. S-ino N. A. Holmes, London, Anglujo.

18. S-ino A. L. Blacklock, Ipswich, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

70. S-ro K. Alexander, New Malden, Anglujo.

71. D-ro C. M. Bean, London, Anglujo.

72. S-ro S. Bellatti, Bromley, Anglujo.

73. S-ro W. Cunningham, West Wemyss, Skotlando.

74. S-ino E. Dickson, Letchworth, Anglujo.

75. S-ro N. R. Smith, Swindon, Anglujo.

76. S-ino H. de Vere, Wrotham, Anglujo.
77. S-ro R. B. Wilkinson, London, Anglujo.
78. F-ino I. C. Fortey, Leicester, Anglujo.
79. S-ro B. R. Zeiner, Barry, Kimrujo.
80. S-ro E. Collins, Hamilton, Ont., Kanado.
81. S-ro C. Ramsey, Devonport, Tasmanio.
82. S-ro S. Grzeskowiak, Gostyn, Polujo.
83. S-ro J. Andrzejczak, Łódź, Polujo.
84. Pastro P. Pieta, Strazów, Polujo.
85. S-ino W. Hierowska, Zgierz, Polujo.
86. S-ro H. Holender, Szczecin, Polujo.
87. S-ro W. Misiewicz, Radom, Polujo.
88. D-ro J. Muszynski, Łódź, Polujo.
89. D-ro J. Penson, Łódź, Polujo.
90. S-ro J. Pujdak, Łódź, Polujo.
91. S-ro J. Rogozinski, Łódź, Polujo.
92. S-ro B. Sadowski, Warszawa, Polujo.
93. D-ro R. Soloniewicz, Zgierz, Polujo.
94. S-ro T. Stachurski, Łódź, Polujo.
95. S-ro J. Stenström, Ulricehamn, Svedujo.
96. F-ino E. Olsson, St. Essingen, Svedujo.
97. S-ro I. Svensson, Tibro, Svedujo.
98. S-ro W. A. Donner, Bedford, Ohio, Usono.
99. S-ro W. Ewing, Hillsboro, Ore., Usono.
100. S-ro E. T. Lake, Cranford, N. J., Usono.
101. S-ro J. Vidack, Seattle, Wash., Usono.
102. D-ro F. E. Ballard, Reseda, Calif., Usono.
103. S-ro J. L. Chapman, West Palm Beach, Fla., Usono.
104. S-ro E. G. Dodge, Washington, D.C., Usono.
105. S-ro H. R. Dreyer, Berkeley, Calif., Usono.
106. S-ro J. Eisele, St. Louis, Mo., Usono.
107. S-ro G. P. Ferree, Mill Hall, Pa., Usono.
108. S-ro D. Gibson, Seattle, Wash., Usono.
109. S-ro F. Mitschke, Paterson, N. J., Usono.
110. S-ro H. W. Smart, Brooklyn, N. Y., Usono.
111. D-ro C. Stockard, Bradenton, Fla., Usono.
112. D-ro C. R. Witt, Santa Monica, Calif., Usono.
113. F-ino H. Wolff, San Francisco, Calif., Usono.
114. S-ro M. Bolsius, Antwerpen, Belgujo.
115. S-ro R. Geerinck, St. Niklaas, Belgujo.
116. S-ro L. Magotteaux, Liège, Belgujo.
117. S-ino F. Staes-v.d. Voorde, Bruxelles, Belgujo.
118. S-ro F. V. Taylor, Albury, Aŭstralio.
119. S-ro Teixeira Lino, Fundao, Portugalujo.
120. S-ino M. T. D. Denton, Cliftonville, Anglujo.
121. S-ro R. H. K. Hill, King's Lynn, Anglujo.
122. S-ro T. H. Ridpeth, London, Anglujo.
123. S-ro F. W. Crofts, Guildford, Anglujo.
124. F-ino R. G. M. Fraser, Ilford, Anglujo.
125. F-ino E. M. Pearson, York, Anglujo.
126. S-ro G. H. A. Turton, Huddersfield, Anglujo.
127. S-ro B. Szychulski, Poznań, Polujo.
128. S-ino E. Czelicka, Warszawa, Polujo.
129. S-ro S. Fethke, Warszawa, Polujo.
130. S-ro E. Gernand, Bedków, Polujo.
131. S-ro J. Dratwer, Warszawa, Polujo.
132. S-ro E. Jaraczewski, Warszawa, Polujo.
133. S-ro Fel. Kropielnicki, Gdansk, Polujo.
134. S-ro W. Monarszynski, Wrzesnia, Polujo.
135. S-ro R. Nowakowski, Wroclaw, Polujo.
136. S-ro K. Raczko, Wroclaw, Polujo.
137. S-ro J. Wojtas, Radom, Polujo.
138. S-ro J. Zawada, Warszawa, Polujo.
139. S-ro A. Czubrynski, Wlochy, Polujo.
140. S-ro I. Kushlick, Benoni, Sud-Afriko.
141. S-ro M. Danowski, Warszawa, Polujo.
142. S-ro A. Perrin, Paris, Francujo.
143. S-ro L. Apcher, Meknes, Maroko.
144. S-ro C. W. Dale, London, Anglujo.
145. S-ino F. Jakob, Genève, Svisujo.
146. F-ino S. W. Bloemendal, Lochem, Nederlando.
147. S-ro J. P. v. Dijk, Rotterdam, Nederlando.
148. S-ro P. M. Mabeoone, Amsterdam, Nederlando.

149. S-ro Wen Chiching, Bangkok, Siamio.
150. S-ro A. Cotton, Sèvres, Francujo.
151. S-ro R. Watier, Paris, Francujo.
152. S-ro F. W. Breth, Petrolia, Pa., Usono.
153. S-ro E. L. Clarke, Winter Park, Fla., Usono.
154. S-ro J. F. Clewe, Los Angeles, Cal., Usono.
155. S-ro D. M. Earl, Detroit, Mich., Usono.
156. S-ro A. Knapp, Chicago, Ill., Usono.
157. S-ro Wm. A. Knox, Cloverdale, Mich., Usono.
158. S-ro F. W. Vedder, Miami, Fla., Usono.
159. S-ro O. Poehlmann, Detroit, Mich., Usono.
160. S-ro C. Cerri, Varese, Italujo.
161. S-ro A. Martin, Macon, Francujo.
162. S-ro B. S. Ohana, Marrakech, Maroko.
163. S-ro R. G. Robbins, Wanganui, Nov-Zelando.
164. S-ro T. C. Baillie, Worksop, Anglujo.
165. S-ro R. G. Millidge, Sutton, Anglujo.
166. S-ro H. H. Winter, Thorpe-next-Norwich, Anglujo.
167. S-ro W. G. Atkinson, Walton-on-Naze, Anglujo.
168. S-ino L. E. Blacklock, Parkstone, Anglujo.
169. S-ro W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.
170. F-ino A. F. Jobbins, Tunbridge Wells, Anglujo.
171. S-ro R. A. Newland, Watford, Anglujo.
172. S-ro G. H. Parker, London, Anglujo.
173. F-ino E. Riding, Herne Bay, Anglujo.
174. S-ro R. Robertson, London, Anglujo.
175. S-ro J. H. Shaw, Swanwick, Anglujo.
176. S-ro F. Thurgood, London, Anglujo.
177. S-ro J. W. Varley, West Hartlepool, Anglujo.
178. S-ino D. M. Worcester, London, Anglujo.
179. S-ro L. Spies, Chingola, Nord-Rodezio.

DONACOJ al la ĝenerala kaso : H. K. Phelan 5ŝ., E. Collins 1ŝ., A. Morton 2ŝ. 6p., H. Milsom 2ŝ., F-ino V. C. Nixon 5ŝ., G. E. Walker 3ŝ., W. Cunningham 5ŝ., F-ino J. H. Iredale 5ŝ., F-ino N. Hanson 5ŝ., P. P. Christensen 186ŝ., S-ino V. Reed 10ŝ., H. P. Devenish 2ŝ. 6p., W. B. Laurie 7ŝ. 6p., F. Coles 2ŝ. 6p., D. Tilly 7ŝ. 6p., I. S. Maddern 3ŝ.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo : G. P. Turner 20ŝ., F. V. Taylor 5ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Grava informo por Francoj—Pro la ŝanĝo en la valoro de la franko ni devas aliigi la kotizojn en francoj landoj. La nova tarifo estas—MJ 200, MA 500, MS 1000 francaj frankoj.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Januaro 1947 :

	1947	1948
Asociaj membroj ..	1376	1706
Individuaj membroj :		
MJ	357	340
MA	2170	2110
MS	175	178
Patronoj ..	15	18
DM	109	160
HM	20	55
	2846	2861
	4222	4567

Noto : Oni devus ne kompari la suprajn ciferojn kun la ciferoj je la fino de 1947, ĉar ĉiam en Januaro ni rekomencas la numeradon de la membraro. Ĝusta komparo estas ebla nur kun la sama monato en la antaŭa jaro.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

La Gildo de Sankta Ajdan—Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo—nun havas membrojn en 30 landoj, sed pro cirkonstancoj nur malmultaj kapablas helpi modelfare aŭ finance. La anaro tiel kreskis pli rapide ol niaj fortoj, kaj ni malinkline decidis kelktempe nek plu reklami nek alimaniere serĉi novajn alilandajn anojn. La monon kaj tempon tiel konserveblajn ni dediĉu rekte al modelfarado ĝis ni kompletigos miniaturan vilaĝon—grandega tasko—por gajnado ekspozicie. Tiam sur praktika financa bazo ni denove disvastigu niajn celojn. Intertempe ni tenu la intereson de la nuna anaro, eldonante duonjaran informan cirkuleron; kaj ni ne forturnu novajn anojn, se ili volos aliĝi. Tamen ni silentas por laboradi; do ĉiu bonvole postulu de ni kiel eble plej malmulte da korespondado. Pacienca semadon ĝis sekvos la fruktoj!

Komerco-kontaktoj kun eksterlando dezirataj. Adresu detalojn, proponojn al S-ro Ben Ehrlich, 74 Birriga Road, Bellevue Hill, Sydney, N.S.W., Aŭstralio.

53 gekursanoj, gelaboristoj de ŝtata sukeraĵ-fabriko "Wedel", deziras korespondi kun gekomencantoj el ĉiuj landoj: Esperanto-kurso, "Wedel", Zamojskiego 28, Warszawa, Polujo.

Deziras korespondi: temoj:—abelkulturado, kanotendado, kaj etnologio aŭ naturismo. S-ro Blake, "Hilton", Tower Hill, Horsham, Anglujo.

Poŝtkartvesperon aranĝos Esperantistoj en urbo Ostrava-Hulváky komence de Aprilo. Adreso: V. Piotrovsky, Čajkovského 44, Ostrava-Hulváky, Ĉeĥoslovakujo.

S-ro Antonio Cadima, internacia komerca agento en Angolo, kun bonaj interrilatoj en la lando, akceptas reprezenti ĉiuspecajn varojn. Importas kaj eksportas. Adreso: Nova Lisboa, Angolo.

Letervesperon aranĝas la 30an de Majo la E-grupo en Stankov. Al ĉiu ni respondos per bela kaj bele afrankita poŝtkarto. Skribu al Josef Vesely, Stankov 165, Ĉeĥoslovakujo.

Bradford Esperanto-Societo deziras aranĝi letervesperon en Marto. Bonvolu sendi leterojn kaj poŝtkartojn al S-ino E. Edmondson, 6 Raven Street, Bingley, Yorkshire, Anglujo. Nepre respondos.

Letervespero okazos fine de Marto. Skribu multnombre, prefere per ilustritaj poŝtkartoj por ekspozicio en la urba turisma oficejo. Certe respondos. Vejle Esperantoklub, Stampevej 14, Vejle, Danujo.

Maurice Garreau, 12 Boulevard Gallieni, Port-Lyautey, Maroko deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun ĉiuj landoj.

21-jaraĝa Hungara fraŭlo deziras korespondi kun Baptistanoj. Adreso: Károly Bozó, Hajnal-u. 4, Békés I, Hungarujo.

Ildiz de Armas, Str. Araujo 411, Dto. 2, Buenos Aires, Argentino deziras korespondi kaj interŝanĝi florojn kun Ĉinujo, Japanujo, Hindujo, kaj Afriko. Nepre respondos.

Cetó luksaj kosmetikoj: ŝmiraĵoj antaŭŝminka adstringa, kaj puriga po 10 int. resp. kup. Haŭtnutraĵo 14 rpk. En 2-uncaj belkoloraj plastikaj vazetoj. Skribu al: 17 Mordene Close, Manchester 9, Anglujo.

LA VANA KANTO

Lucien Thèvenin

Versoj dediĉitaj al la internacia amikeco

64 paĝoj, broŝ., 2 ŝil. (8 rpk.)

Mendu ĉe U.E.A.

Kiel LA TRAJNO mortis ?

Kial LA TRAJNO mortis ?

Kiu igis LA TRAJNON morti ?



La respondoj al ĉi tiuj demandoj troviĝas en la baldaŭ aperonta verko

MORTO DE TRAJNO

La plej nova verko de tiu unuaranga verkisto de detektiv-romanoj

FREEMAN WILLS CROFTS

VIVO DE ZOLA

Aŭgusteno de Silva

Tradukita de M. de Freitas

106 paĝoj, broŝ. 3ŝ., afranko 3p. (13 rpk.)

"Oni povas senti dankon al la tradukinto, ke li prezentis al la internacia legantaro tiel bonan biografion, ne nur por refreŝigi la memoron pri Zola, sed ankaŭ por atentigi al ni la makulojn en nia homa socio, kiuj ankoraŭ—bedaŭrinde—estas tre aktualaj." M.S. en *Esperanto Internacia*.



Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Herónsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



TATRA—ŝaŭmigilo, la pulvoro, el kiu vi facile, simple kaj tuj preparos bongustan, dolĉan, ŝaŭmetantan TRINKLIMONADON. Mendu skatolon, kiu enhavas 35 porciojn kun recepto en Esperanto. Kontraŭ antaŭpago 15 rpk. aŭ egalvaloro ekspedas ĝin rekomendite :

JAROMÍR PAVLACKÝ

Veselí nad Moravou, Ĉeĥoslovakujo.

Se vi deziras pagi aliamaniere (per Esperantaj libroj, varoj, k.t.p.), petu senpagan prospekton. Liverebla en la tuta mondo. (Nur en Germanujo mi ne havas provizore liverpermeson).

LIBRO EL ĈINUJO

ELEKTITAJ NOVELOJ

De LU SIN

Broŝurita 140 pagoj

Prezo 3 ŝil., afranko 3p. (13 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

ESPERANTA LEGOLIBRO

VILHO SETÄLÄ

Bindita 112 pagoj

Prezo 2 ŝil. 6p., afranko 4p. (11 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

PETRO

Kursa lernolibro, aŭ simpla
legolibro, por laboristoj

7-a eldono

Broŝ. 112 pagoj

Prezo 2ŝ. 9p., afr. 3p. (12 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Ĉu vi jam legis la problem-romanon

D-ro DORNER ?

De H. L. EGERRUP

Se ne, aĉetu kaj legu ĝin nun ! Ĉie
oni pridiskutas ĝiajn problemojn.
Partoprenu ankaŭ vi la pridiskuton !

Broŝ. 8 ŝil., afranko 6p.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo